

BONA RIDO

Anekdotaro
kolektita kaj esperantigita
de
AXEL A. HELM

Eldona Societo Esperanto
MALMO

e-Librigita de ELERNO
Dec. 2012

Antaŭparolo

Malnova sveda proverbo diras: “Bona rido plilongigas la vivon”. Se mi per tiu ĉi libreto iomete povus efektiviĝi la sencon de la nomita proverbo, estus por mi granda ĝojo.

La plimulto de la homoj en la mondo certe deziras vivi kiel eble plej longe, malgraŭ la abomenindaj kaj malfacilaj cirkonstancoj, kiuj regas sur nia malfeliĉa terglobo.

Tamen ne estas malutile por la bonstato kelkfoje iomete ekmovi la ridmuskolojn.

Inter la ĉi tie kolektitaj anekdotoj ankaŭ troviĝas historieto, kun la rubriko “La stranga pordo”, kiun mi tradukis jam en la jaro 1926 por la sveda esp-gazeto “La Espero”. En 1928 la rusa aŭtoro S. Ŝabarin eltondis ĝin por presigo en la lerno- kaj legolibron “Lerna esperanta krestomatio” eldonita de C.K.—S.E.U. Moskvo—U.S.S.R. La historieto lokiĝis kiel numero 2 en la kolekto de 46 tiaj pecoj.

Mi deziras esprimi mian sinceran dankon al sinjorino Karin Strandberg, Lund, kiu uzis sian liberan tempon por la neskribado de la manuskripto. Ankaŭ al ĉiuj aliaj bonvolaj helpantoj mi esprimas mian koran dankon.

Al la esperanto-leganta publiko en diversaj partoj de la mondo mi deziras, ke tiu ĉi libreto estiĝu eta rimedo al ĝojo kaj distro—kun multaj gajaj ridoj.

Se la libreto plaĉos al la legantaro, mi eble daŭrigos la kolektadon de amuzaj anekdotoj por eventuala dua parto.

Hästveda, Svedujo, 1965

La kolektinto

Amu vian malamikon!

La pastro al la nereformeblulo:

- Vi ja scias, Ola, ke la alkoholo estas via plej danĝera malamiko!
- Jes, sed estas skribite, ke oni devas ami sian malamikon.
- Tre vere, sed ne, ke oni englutu lin, Olga, — ne, ke oni englutu lin.

En la lernejo

- Se mi diras: “La knabo donis”, kiu tempo estas?
- Pasinta tempo.
- Ĝuste. Kaj kiam mi diras: “Via patro havas monon”, kiu tempo do estas?
- Ĉirkaŭ la unua en la monato.

Ŝanĝigas la tempoj

—Sinjorino, en la pasporto estas indikite, ke vi havas nigran hararon, sed via hararo ja estas blonda.

—Ho jes, sed la pasporto estas de la pasinta jaro.

Moderna matematiko

- Mi intencas viziti Parizon dum dek tagoj. Kion vi opinias, amiko Frita. Kiom da mono mi bezonas porti kun mi?
- Dumil markojn, se vi vojaĝos sola. Sed, se vi iros kun via edzino, sufiĉos mil markoj.

Infana intereso

- Pacjo, ĉu estas vere, ke en la malnova tempo la homoj vivis dum okcent jaroj?
- Jes, fileto, estas vere.
- Kaj diru, ĉu ili devis frekventi lernejon dum ducent jaroj?

Gramatiko

- Diru, Tom, kiel oni uzas la vorton ”pantalono”, ĉu en singularo aŭ pluralo?
- Supre en singularo, malsupre en pluralo.

Praktika anatomio

Malsanulo: La apendico estas tute superflua parteto en la korpo. Mi povas tre bone vivi sen ĝi.
Kuracisto: Vi, jes, sed ni kuracistoj, ne.

Literatura ekzameno

Profesoro: Kion oni konsiderus pri la poeto Goethe, se li nun estus vivanta?
Kandidato: Ke li estas la plej maljuna loĝanto de Germanujo.

Pli altaj studoj

Filino: Post la fino de la mezlernejo mi studos biologion kaj fiziologion.
Patro: Sed estus pli bone, se vi lernus la kuirologion, lavologion kaj kudrologion.

Ne estis bezonate

Meznokte sonoris la telefono ĉe deĵoranta kuracisto. Li ekstaris el sia plej ĉarma dormeto, ekprenis la telefonaŭskultilon, kaj aŭdis ekscitan voĉon: Vi devas tuj veni, s-ro doktoro. Mia fileto englutis korktirilon!

—Mi venos, diris la kuracisto. Sed ĵus kiam li estis ironta, la telefono ree eksonis.

—Vi ne bezonas veni, diris la voĉo, ni jam trovis alian korktirilon.

La scenejo estas akceptejo de okulkuracisto. La kuracisto karese frapetis junan viron sur la ŝultron dirante: —Jes, junulo mia, volonte mi helpus vin ricevi oficon en la administracio, sed mi ne povas, ĉar la vidkapablo de via maldekstra okulo havas nur 0,3.

—Ne tiel malbone, doktoro, ĉar temas pri emajla okulo.

Bankestro konatiĝis kun fotomodelo, enamiĝis, kaj volis edziĝi al ŝi.

Sed unue li volis scii iom pri ŝi kaj sukcesis igi unu el siaj amikoj dungi privatdetektivon por esplori ŝian privatan vivon. Verŝajne li suspektis, ke ŝi eble estas iom frivola.

Iom post iom venis la raporto de la detektivo:

La nuro en tiu ĉi afero, kiun mi povas kritiki koncerne la virinon, estas, ke ŝi dum la lasta tempo tro ofte vidiĝis kun bankestro, havanta tre dubindan reputacion.

—Nu, kiel estas nun, li ekscitite demandis. Hieraŭ vi diris, ke mi kverelas pri ĉio, kaj hodiaŭ, ke mi kverelas pri nenio.

—Kion vi farus, se vi posedus ĉiun monon en la tuta mondo?

—Do... eble mi repagus miajn ŝuldojn, tiom longe, kiom la mono sufiĉos.

Juĝisto: Kiel vi povis surprizataki tiel maljunan mizerulon?

Akuzito: Jen, mi estus farinta tion antaŭ multaj jaroj, sed ĉiam io intervenis... aŭ li estis en karcerio aŭ mi.

—Kial vi ne aĉetas varojn ĉe Andersen?

—Ne, li estis fianĉiĝinta al mia edzino antaŭ ol mi edziĝis al ŝi — kaj mi vere ne volas komerci kun iu, kiu estas pli saĝa ol mi.

Tro multe dirite

Ili estis forŝovintaj la neĝon de sur la benko en la parko kaj sidiĝis rigardante la stelojn alte super la branĉoj de la arboj.

Ŝi diris:

—Ĉu vi volas edziĝi al mi?

—Jes, li diris.

Poste estiĝis silento. Post momento ŝi diris:

—Kial vi nenion diras?

Li:

—Mi opinias, ke mi jam diris tro multe.

Post la geedziĝo ni aŭtomobile forvojaĝis.

—Kie vi pasigis la mielmonaton?

—En la malsanulejo.

—Sinjoro profesoro, vi havas unu brunan kaj unu nigran ŝuojn sur viaj piedoj.

—Jes, ĉu ne estas strange, ke mi hejme ankaŭ havas egalan paron?

—Ĉu vi aŭdis la teruran fulmotondran veteron hieraŭ vespere?

—Ne, mi sidis babilante kun la bopatrino la tutan vesperon.

Nekonata viro envenis frizejon, ĉirkaŭrigardis kaj demandis:

—Ĉu estas multaj antaŭ mi?

—Kvar personoj, diris la frizisto.

La viro malaperis sed revenis la postan tagon. La sama okazis.

—Ĉu multaj antaŭ mi?

—Kvin personoj.

Kaj la viro ree malaperis.

Ĉi tio ripetigis ĉiutage la tutan semajnon.

La frizisto iĝis meditema kaj sendis la metilernanton por sekrete sekvi la viron.

La knabo revenis.

—Nu, ĉu vi vidis, kien li iris?

—Jes.

—Kien?

—Hejmen al via edzino.

Kolera gasto en restoracio alvokis kelneron demandante:

—Kion faras ĉi tiu muŝo en mia supo?

—Ŝajnas al mi, ke ĝi naĝas, sinjoro.

—Ĝuste tion, pastro, diris la novedzo, estas la kvina fojo kiam mi reedziĝas. Bonajn edzinojn oni ja ne povas akiri tro multajn.

Du finnoj ĉasis sovaĝajn anserojn en malebenega tereno, kaj dum ilia serĉado subite unu el ili malbonŝance enakviĝis en marĉon. La alia kuregis al la proksima vilaĝo por havigi helpon.

—Ĉu urĝas, oni demandis en la vilaĝo. Kiel profunde li estas malleviĝinta?

—Ĝis la genuoj.

—Do, ni havas sufiĉe da tempo.

—Ne, ĉar li havas la kapon malsupre.

La instruisto volas provi la inteligentecon de la lernantoj kaj demandas:

—Se tiu ĉi ĉambro estas 6 metrojn longa, 4 metrojn larĝa kaj 3 metrojn alta, la flagstango estas 11 metrojn alta, kaj mia ĉapelo havas grandon de numero 56, ĉu vi povus elkalkuli, kiom da jaroj mi havas?

Kaĉjo suprenetendis sian manon.

—Ĉu vi jam kalkulis tion, Kaĉjo?
—Jes, magistro, vi havas 42 jarojn.
—Estas ĝuste. Sed kiamaniere vi povis elkalkuli tion?
—Hejme en nia bieno ni havas serviston, kiu estas duonidioto, kaj li havas 21 jarojn.

—Sinjorino, lasu al mi diri, ke vi aspektas egale juna kiel via filino.
—Mi petas atentigi vin, ke mi estas la filino.

Junulo serĉis okupon en manĝaĵa butikoj, kaj la ĉefo demandis lin:
—Ĉu vi havas ian sperton pri nutraĵoj?
—Jes, tion oni vere povas diri. Mi manĝis ĉiutage dum dekkvin jaroj.

—Kiel via frato fartas post la operacio?
—Komplikaĵo aliĝis.
—Kiel malĝoje!
—Li fianĉiĝis al la flegistino.

Enskribado de rekrutoj

Unu el ili, afable demandita, al kiu trupspeco li dezirus aparteni, respondis:

—La generalstabo.
—Ĉu vi estas tute freneza, viro?
—Ne, ĉu oni devas esti tia?

—Mi esperas, ke ni ne ĝenis vin tro multe dum la nokto. Estis la rajdklubo, kiu estis hejme ĉe mi.
—Ne, tute ne, sed kiamaniere vi suprenigis la ĉevalojn?

—Aŭskultu, junulo mia, diris la profesoro, ĉu mi rajtas demandi vin, en kiu lernejo vi akiris ĉi tiun maloftan mankon de sciado?

Nenecese

Afraim Karlson envenas en la senlaboruloficejon por stampigi sian karton. Malĝentile li ne demetis sian ĉapon.

Ĉefkontoristo: Demetu vian ĉapon, enirante ĉi tien!

Efraim: Oni ja stampu sur la kapon...

—Knabineto staris sur la trotuaro rigardante ĉevalon—unuopaj ekzempleroj de la bona hejma besto ekzistas ankoraŭ—dum la veturigisto estis en butikoj por transdoni siajn varojn. Kiam li elvenis, la knabineto diris al li:

—Nun la ĉevalo ne povas iri plu.
—Kial? demandis la veturigisto.
—La benzino tute elfluis.

Tiel estas skribite

Andersen venis por peti la pastron bapti la lastnaskiton.

La pastro: Kiu estas tiu ĉi laŭ la vico?

A: Numero 14, pastro.

La pastro: Jes, estas ja nur bone, Andersen, sed, ĉu ne sufiĉas nun? Estiĝos tro multaj por vivteni aliokaze.

A: Estas ja skribite: Reproduktu vin kaj plenigu la teron.

La pastro: Jes, sed ne estas skribite, ke nur vi sola faru tion.

Kompromitiĝo

Viro, forvojaĝinte por festi novjaron en granda kunestado, trovis neniun sidlokon deciditan por si. Nur la loko apud la mastrino estis neokupita. Vid-al-vide sur la tablo tronis granda porkkapo kun pomo en sia buŝo.

—Bone, mi sidiĝas apud la porko.

La mastrino ĉagreniĝis pro la sentakta esprimo, kaj la viro provis mildigi sian esprimon:

—Hm, mi kompreneble opinias la rostitan

—Ĉu vi konas iom pri grandkomercisto Svensson?

—Ne, nur tion, ke li raziĝas je la sama loko kiel mi!

—Kie do?

—En la vilaĝo.

—Estas terure kiel li gestadas per siaj brakoj, kiam li parolas.

—Jes, sed li ja kaptas siajn asertojn el la aero.

Ŝi havas kutimon

SinJORINO Janson estis anoncinta por dungi infanartistinon. Juna virino venis, aspirante la anoncitan okupon.

—Ĉu vi antaŭe vartis infanojn.

—Jes, tion mi devas diri.

—Ĉu vi ŝatas infanojn?

—Jes, tre.

—Ĉu ili havis infanojn ĉe via antaŭa okupo?

—Jes, tri filojn.

—Kiom da jaroj havis la plej juna?

—Dudek du.

—Monatojn?

—Ne, jarojn?

—Cent kronojn. Estas tro alta prezo por ĉi tiu hundo. Ĉu ni diru la duonon?

—Ne, mi vendas nur la tutan hundon.

La eta fakulo

Instruisto: Jen estas la frazo: “Mia patro aĉetas teatron”. Nun metu ĉi frazon en la tempojn pasintan, estantan kaj venontan.

Fileto de teatra direktoro: “Mia patro havis multan monon... Mia patro aĉetas teatron... Mia patro

bankrotos.

Elektra pseŭdonimo

—Antaŭ ol enloĝi, diris la nova luanto, mi volus mencii, ke mi estas poeto, sed mi uzas pseŭdonimon.

—Ne estas grave, respondis la luiganta virino, se ĝi ne uzos tro multe da elektra energio.

Antaŭe kaj nun

Du patroj iufoje renkontiĝis en la urbhotelo:

—Strange kiel infanoj ŝanĝiĝas.

—Kiamaniere? Mi oponias, ke miaj infanoj tre similas al si.

—Ho ne. Antaŭ kelkaj jaroj mia filo ne rigardis ion alian ol stansoldatojn, kaj pensis nur pri militistoj, kaj mia filino ne rigardis ion alian ol pupojn. Sed nun estas tute kontraŭe—la knabo strabrigardas nur pupojn, kaj la knabino nur militistojn.

Junulo iam igis sin sprita, dirante al la knabino en la gazetejo:

—Donu al mi la idiotĵurnalon.

Ŝi rapide respondis:

—Tiun ĵurnalon ni ne vendas. Kutime ĝi estas sendata senpere al la membroj.

Du virinoj sidis, diskutante la mondproblemojn. Unu estis edziniĝinta kaj pli aĝa ol la alia, kiu estis en la dua jardeko.

La juna needziniĝinta demandis:

—Kio estas "fata morgana"?*

—Ho jes, respondis la pli sperta, estas io pri kastelkonstruado en aero, palmoj kaj kameloj. Akurate tiel, kiel ĉe enamiĝo kaj edziniĝo. La tuta agrableco malaperas. Nur la kamelo restas.

*La vortoj devenas de strangaj miraĝoj, kiuj vidiĝas ĉe la marbordoj de Sicilio kaj Kalabrio, kaj, kiuj de la popola fantazio perceptiĝas aŭ kiel admirindaj ĝardenoj aŭ kiel sorĉaĵoj.

Jakobo vizitis la lokan jarfoiron, kaj post gustumado de diversaj dolĉaĵoj li sentis stomakdoloron. Li iris al la apotekisto, kiu promesis kuracon. Antaŭ ol intermiksi la medikamenton, li demandis pri la distanco ĝis la hejmo de Jakobo. Li respondis pri tio, englutis la medikamenton kaj iris hejmen. Kiam li post kelkaj monatoj ree venis en la apotekon, la apotekisto rekonis lin kaj demandis pri la rezultato.

—Ho jes, dankon, diris Jakobo. Vi devus esti iĝinta termezuristo anstataŭ apotekisto, ĉar la distanco ne estis erara eĉ je unu metro.

—Vi estas tute sana, diris psikiatro al laŭdata teatra stelulino el Hollywood. La nura, kiun vi bezonus, estas iom da ŝanĝiĝo.

—Ŝanĝiĝo, kriis la malespera stelulino. Dum la lastaj tri jaroj mi jam ŝanĝis edzon kvar fojojn, kuiristinon sep fojojn, kaj aŭtomobilon ok fojojn... ĉu tio ne estas sufiĉa ŝanĝiĝo?

SinJORINO rondveturas per propra aŭto. Observante telefonlaboriston grimpi supren sur telefonfosto, ŝi diris al si mem:

—Ho, kia stultulo, li eble opinias, ke mi neniam antaŭe direktis aŭtomobilon.

Pensiona gasto: Pluvas tra la plafono en mian ĉambron. Kiel longe tio daŭros?

Gastigantino: Telefonu al la meteorologia servo.

—Numero 83 Johnson, ĉu vi povas diri, kiu estas la plej altranga en skadro?

—Estas la skadrestro.

—Ĝuste. Kaj tiu estas plej proksime sub li?

—La ĉevalo.

Kamparano transportis sterkon per sia ŝarĝveturilo, kaj estis haltigita de knabeto, kiu demandis al li:

—Kien vi transportas ĝin, Onklo?

—Al Nila Palo, li havos ĝin por siaj ĝardenfragoj.

La knabeto, kiu pro ia motivo malŝatis tiun Palo, diris sarkasme:

—Ha, ha, tio konvenas al li. Hejme li manĝas ĝardenfragojn kun kremo kaj sukero.

—Kial vi ne transdonis al ni la milkronan bankbileton, kiun vi trovis? demandis la ĉefpolicisto.

—Mi kredis, ke ĝi estis falsa.

—Kaj kiam vi komprenis, ke ĝi estis nefalsa?

—Kiam mi ŝanĝis ĝin en la banko.

Johano reme transportis komercan vojaĝiston trans la lagon. Estis forta vento, kaj pro tio okazis ne pli bone ol, ke unu el la valizoj de la vojaĝiisto falis en la akvon. Vidante tion, la remisto diris:

—Nun la valizo iris inferen. Ĉu ĝi havas adresetikedon?

—Jes, ĝuste tion.

—Tiuokaze vi certe ricevos ĝin, kiam vi mem alvenos tien.

Malluman vesperon biciklante, Nils hazarde venis renkonte al la distrikta prokuroro.

—Vi devas havi la lanternon lumanta.

—Tion mi ja scias, sed ĝi ne lumas.

—Tiuokaze vi iru piede kaj konduku la biciklon, diris la prokuroro.

—Mi tion ankaŭ provis, sed ĝi tamen ne lumis.

—Bonvolu pesi ĉi tion por mi, diris sinjorino, metante paketon sur la vendotablon.

—Volonte mi tion faros, diris la viandvendisto.

—Ĝi pezas unu kaj duonan kilogramojn.

—Dankon, diris la sinjorino. Estas la ostoj de la rostaĵo je du kilogramoj, kiun vi vendis al mi hieraŭ.

Vestibla sonorilo sonas, kaj sinjoro Hanson mem malfermas la pordon.

Ekstere staras viro demandante:

—Ĉu eble vi estas interesata por aĉeti leteran malfermigilon?

—Ne, dankon, mi jam estas edziniĝinta al unu.

—Mi ne povas ekzakte diri kioma horo estis, kiam mi hejmenvenis hodiaŭ matene, sed eble estis inter la kvara kaj kvina.

—Kiel vi do povas scii tion?

—Ĉiam la horo estas tioma, kiam mi ne scias kioma ĝi estas.

—Ombroflankoj kaj ombroflankoj, ŝi maldolĉe diris. Ĉu estas vere tiel strange, ke mi vidas nur la ombroflankojn de nia geedzeco—tiel ofte, kiel vi kondukis min malantaŭ la lumon?

—La kaŭzo de mia vegetaraniĝo estis mia opinio, ke estas malĝuste mortigi senkulpajn bestojn.

—Ĉu vi opinias, ke estas pli delikate formanĝi la furaĝon de ili?

—Kial vi tiel malfrue hejmenrevenas?

—La subparohestro estis en la vilaĝo, kaj li petis veturi kun mi.

—Pro tio vi ja ne bezonis reveni tiel malfrue.

—Ho, jes, vi komprenu, la ĉevalo ne komprenis eĉ unu vorton el tiuj, kiujn mi diris, post kiam la pastro sidiĝis en la ĉaron.

—Agda, kien vi metis la novajn mantukojn?

—Pro kio vi volas scii tion?

—Mi volas vidi la nomon de nia hotelo en Innsbruck.

—Vi estas tiel silenta, Signe. Vi ne estas dirinta eĉ unu vorton la lastajn dek minutojn.

—Mi havas nenion por diri.

—Ĉu vi neniam diras ion, kiam vi nenion havas por diri.

—Ne.

—Signe. Ĉu vi volas edziniĝi al mi?

Frua matureco

—Ĉu vi scias, kio okazas al tiuj knabinoj, kiuj mensogas?

—Jes! Ili duonpreze veturas per la tramo.

—Pardonu al mi, sinjoro ĉefo, ĉar mi venis tro malfrue. Mi havis fakte malhelpon, sed tio ne estas mia kulpo... estiĝis pligrandigo de nia familio...

La ĉefo: Ne via kulpo? Kies kulpo do estas?

Knabeto envenis en la apotekon demandante:

—Ĉu estas ĉi tie oni vendas ricinoleon?

—Jes, amiketo mia, ĝuste tion.

—Fi, hontu.

—Aŭskultu vi, Johan Pers, tiu bovino, kiun vi vendis al mi mortis pasintan semajnon.

—Estas strange. Tion ĝi neniam faris, kiam mi ĝin havis.

Maljunulino unuan fojon vojaĝus vagonare kaj rigardis tra la giĉeto en la ekspedejon, kie la nekutime bonkreska staciestro sidis.

—Pro Dio, kiel vi estas enveninta tra tiun ĉi etan aperturon? ŝi scivole demandis.

—Mi enrampis, kiam mi estis malgranda, kriegis la kolerega staciestro.

Profesoro Tankberg jam manĝis en la kutima gastejo. Li pagas kaj forlasas la lokon, sed post kelkaj minutoj li ree sidas apud la sama tablo, mendante laŭ la sama menuo kiel antaŭe.

—Sinjoro profesoro, diras diskrete la kulnero al la distritulo, vi ja ĵus manĝis.

—Ĉu vere, respondis la profesoro, fikse rigardante la kelneron.

Poste venis la klarigo:

—Kelnero, tio estas la kulpo de la malbenita turnpordo...

Du malbonfamaj vagistoj renkontiĝis en la malliberejo. Unu estis punata pro ŝtelo de horloĝo, la alia pro ŝtelo de bovino. La lastenomita sarkasme demandis:

—Kioma horo estas?

—Mi opinias, ke nun estas tempo por melki.

—Pensu, kiel strange, profesoro, mia edzo mortis en la datreveno de sia naskiĝtago.

—Hm, mi iam havis konaton, kiu envenis en la mondon ĝuste en sia naskiĝtago.

Preposto estis dunginta viron por prizorgi sian etan terposedaĵon. Bedaŭrinde la nove dungita servisto ne estis sufiĉe sperta rilate al rikoltmaŝinoj. Kiam tia malfunkciis la servisto montris sian koleron pro tio per vortoj, kiuj ne estis konvenaj en pastrejo. La preposto aŭdis la malbenojn kaj moralinstruis lin dirante:

—Kara Botvid, kio okazos al vi, kiam vi mortos? Ĉu vi ne kredas, ke la diablo vin venigos, ĉar vi tiel alvokas lin?

—Ne, respondis Botvid, certe estiĝos pli malbone al vi, s-ro preposto, kiu ĉiudimanĉe staras en la predika katedro parolante malbonon pri li.

Kio estas bovino?

Bovino estas kompleta laktproduktanta maŝino, kiu estas enpakita entanita ledο kaj muntita sur kvar vertikalaj moveblaj apogiloj—unu en ĉiu angulo.

La nova paroĥestro faris viziton en la malliberejo. Rimarkante unu el la malliberuloj li diris:

—Mi estas vere surprizita vidi vin ĉi tie. Vi ja devenas el fame konata familio.

—Jes, ja, sed ĉi tie oni ja ne konsideras tion.

—Via geedzeco certe saviĝus, se vi provus konsenti al li pri liaj interesoj. Pri kio li estas interesata?

—Pri la knabinoj en la kontoro.

Matilda, vidvino de la relgardisto Jonson, tre volonte dezirus posedi pligrandigitan foton de sia mortinta edzo, sur kiu li pozas, vestite per relgardista ĉapelo. Ŝi eniras en la lokan fotobutikon kaj esprimas sian deziron per demando, ĉu la granda ĉapelo eble povus esti forretuŝita el la bildo. La

fotografisto volantas tion fari laŭ ŝia deziro, sed demandas, je kiu flanko ŝia edzo havis la hardisigon.

—Tion mi ne memoras, sed tion vi ja vidis, demetinte lian ĉapelon.

—Ĉu vi ne havas naztukon, maljuna virino demandis la etan Antonon, kiam li kun muko en la nazo ludis en sablamaso.

—Jes, mi havas, diris Antono, sed panjo estas dirinta, ke mi ne rajtas pruntedoni ĝin al iu.

Li: Vespere ni tre agrable ordigos por ni.

Ŝi: Kion ni faros?

—Mi aĉetis tri kinobiletajn.

—Tri? Kiu do akompanos nin?

—Mi aĉetis unu al via patrino, unu al via patro kaj unu al via frato.

Kolonelo inspektis la novajn rekrutojn kaj ekrimarkis imponan junulon.

—Bone, diris la kolonelo, vi ŝajnas al mi vere militista. Mi deziras premi vian manon. Nun vi povas diri al via patro, ke al vi estis permesite premi manon de kolonelo. Kio estas via patro?

—Generalo, s-ro kolonelo.

La kvarjara Kaĉjo envenas en la ĉambron dum la daŭro de la festeno, laŭte kriante: —Estas cimo sur la muro de la kuirejo.

—Silentu, knabeto, la patrino ekscitite diris. Absolute ne estas cimo, ĝi estas nur najlokapo.

Kaĉjo foriris, sed tuj revenis kriante, je amuziĝo al la ĉeestantoj:

—Panjo, nun iras la najlokapo.

Knabeto venis, kurante al la patrolanta policisto: —Rapidu, policisto—mia paĉjo kaj mia najbaro interbatiĝas. La policisto kunkuris kaj ekvidis du virojn, kiuj vere donis unu al la alia la plej luksajn bluaĵojn kaj “lardolipojn”.

—Kiu el ili estas via patro? demandis la policisto.

—Estas ĝuste tio, pri kio ili interbatiĝas.

Kuracisto: Ekzistas bedaŭrinde nenia espero, ke via edzo povus komenci la laboron en du monatoj.

SinJORINO P.: Tion mi devas tuj diri al li. Tio certe plivigliĝos lin.

Malĝusteco

—Panjo, ĉu estas vere, ke la instruistino en la lernejo ricevas salajron?

—Jes certe, knabineto.

—Kiel malĝuste. Ŝi nur demandas nin, sed ni, kiuj devas scii la respondojn, ricevas nenion.

La pruvo

Viro ekmalsaniĝis. Lia edzino telefone alvokis kuraciston, kiu, post esploro de la viro, donis la diagnozon: “apendicito”.

—Estas erare! ekdiris la viro.

—Absolute estas apendicito! diris la kuracisto iomete ĉagrenite.
—S-ro doktoro, vi eraras, rediris la viro, kaj daŭrigis: Edzino mia, montru al la doktoro mian apendicon, kiu kuŝas en boteleto kun alkoholo.

En la lernejo la instruisto parolis pri gramofonoj kaj aliaj modernaj inventaĵoj.
—Ĉu iu el vi scias, li demandis, el kio estis farita la unua parolada maŝino?
—Jes, instruisto, respondis eta Friĉjo, el ripo.

La nova ĉambristino

—Kaj mi atentigas vin pri ankoraŭ unu afero: Ĉe ni vi devas dormi sur kanapo.
—Volonte, sinjorino. Sed nur dum la tagoj.

La eta diplomato

Filo: —Patro, en ĉi tiu jaro vi havos grandan profiton.
Patro: —Kiel?
Filo: —Por la venonta lerneja jaro vi ne bezonas aĉeti al mi novajn lernolibrojn.

—Doktoro, mi ne povas spiri tra la nazo...
—Spiru do tra la buŝo.
—Kiom kostas?
—Dek kronojn.

Juna matematikisto

—Panjo, ĉu vi scias la kuban mezuron de tiu ĉi bierbarelo?
Patrino: —Ho ne. Demandu la patron.

La kolonelo estas tre fervora por la manĝigo al la regimento. Iam li renkontas du soldatojn, kiuj portas kaldronon, kaj kun embarasitaj mienoj provas rapide malaperi el lia vido.
—Haltu. Havigu al mi kuleron.
Kulero havigata. La kolonelo gustumas kaj kriegas:
—Kia diabla aĉaĵo estas ĉi tio? Tio ja gustas kiel manĝaĵo por porkoj.
—Jes, kolonelo, ĝi estas por porkoj.

Juĝisto: —Vi ja estis atestanto dum la batado inter la geedzoj Larson. Kian impreson vi ricevis de tio?
—Ke mi neniam edziĝos.

Larĉjo venas al sia ludkamaradeto Olle por viziti lin. Larĉjo restas apud la pordo, kaj ŝajnas malkvietiĝi kaj demandas:
—Mi eble ne rajtas eniri, ĉar miaj piedoj estas malpuraj.
—Certe. Vi ja ne bezonos depreni viajn ŝuojn.

Streĉe penigita edzo envenis butikon ekĝemante:
—Mi deziras aĉeti paron da gantoj al mia edzino.

—Kian koloron?
—Estas egale.
—Kian numeron?
—Estas egale.
—Je kia prezo?
—Estas egale. Ŝi tamen venos por ŝanĝi ilin.

La uzinestro estas kune kun amikoj kaj najbaroj en la arbaro por ĉasi alkojn. Subite moviĝis io en la arbedoj. La uzinestro levis la pafilon kaj ekpafis. Poste li kriis:

—Ĉu Svenson estas ĉi tie?
—Jes.
—Ĉu Jonson estas ĉi tie?
—Jes.
—Ĉu Carson ankaŭ estas ĉi tie?
—Jes.
—Do estas alko, efektive.

Malĝoje, sed vere

Instruisto: —Georgo, se mi nun ekzemple pruntedonus al via patro centkronan monbileton, kaj li promesas al mi repagi la sumon po 20 kronoj ĉiun monaton, kiom da mono li do ŝuldas al mi post tri monatoj?

Georgo: —Cent kronojn.
—Vi ja eĉ ne scipovas la plej simplan kalkulon, vi knabo.
—Ho, jes, sed sinjoro magistro, vi ne konas mian patron.

Norlandano dum kongreso koleriĝis je skania kolego kaj ĵetis fine al li jenan salvon:

Globlagra inĝeniero, gastante sian bonan amikon, la grandbienulon, necese volis partopreni leporĉasadon. Oni ekipis la inĝenieron per pafilo, kaj kune kun arbargardisto ili foriris en la arbaron.

Leporo aperis en la pafdistancon multfoje kaj la inĝeniero pafis fojon post fojo. Tamen sen trafi la leporon, kiu estis tre vigla kaj rapidmova. La arbargardisto alpaŝis al la embuskejo demandante:

—Ĉu vi, s-ro inĝeniero, intencas kunporti la leporon hejmen aŭ nur munti globlagrojn sur ĝin?
—Vi nenian inteligentecon havas tie* malsupre.

La skanio, kiu ĉagreniĝis, petis parolon kaj montris al sia frunto respondante:

—Nee, sed ni havas nian inteligentecon ĉi supre.

*=malsupre en Skanio.

Respondo

Ŝi: —Ĉu vi vere per telefono diris al mia patro, ke ni gefianĉiĝis? Kion li respondis?
—Jes mi ne scias, ĉu estas li, kiu respondis, aŭ ĉu estis la fulmotondro, kiu muĝegis.

Ĉefserĝento demandis, ĉu iu el la rekrutoj estas sperta pri ĝardenlaboro. Numero 81 Svenson sin anoncas.

—Estas bone, tiukaze iru en mian koloniĝardenon, kaj elterigu korbon da terpomoj.
Post kelke da tempo la serĝento inspektas kaj trovas Svenson en kavaĵo du metrojn profunda.
—Pro Dio, kion vi faras? Tie vi ja ne povas trovi terpomojn?
—Nee, ekĝemas Svenson, interplektante la manojn super la tenilo de fosilo, sed en la komenco mi trovis kelkajn.

La poŝtadministrado havas siajn ĉagrenojn iufoje pro la klientoj. La poŝtekspedisto redonis leteron tra la ĝiĉeton kun la klarigo, ke ĝi estas tro peza—plej bone surglui ankoraŭ unu poŝtmarkon sur ĝin.

—Ĉu ĝi tiukaze iĝos malpli peza, scivolis la kliento.

Militservodeva skribhelpanto, kiu sidis dormetante en la oficejo, subite vekigis el la dormo pro akresona telefonsignalo. Li respondis per laca kaj peniga voĉo demandante, pro kio oni tiamaniere ĝenas lin dum la laboro.

—Ĉu vi ne scias, kun kiu vi parolas? diris la malafabla voĉo en la alia fino de la dratoj.

—Ne.

—Jes, estas la kolonelo, kiu parolas.

—Ĉu vi, kolonelo, scias, kun kiu vi parolas, demandis la militservulo.

—Ne.

—Estas ja bonŝanco por mi, diris la militservulo, surmetante la aŭskultilon.

SinJORINO ekfalis en la akvon, kaj kavalireca sinjoro proponis helpon al ŝi. De sur la kajo li etendis sian pluvombreton al ŝi.

—Dankon, ŝi diris, mi opinias, ke ĝi ne povas helpi min, ĉar mi jam estas tute tramalseka.

Neniam

Okazis antaŭ nelonge:

—Ĉu via mortinta amiko havis la kutimon paroli kun si mem, kiam li estis sola? demandis la juĝisto.

—Tion mi ne scias, respondis la atestanto.

—Sed vi ja asertis, ke vi estas unu el tiuj, kiuj plej bone konis lin.

—Jes, ĝuste tion, respondis la atestanto, sed mi neniam estis kune kun li, kiam li estis sola.

“Galupa”* intervjuanto iam venis al onkloro Fredrika por intervjui ŝin. Estis vespere, kaj preskaŭ ĉiuj ŝiaj infanoj atendis ekster la banĉambro. Nur du el la sep povas bani sin samtempe. La intervjuanto, rigardante la lavadon, diris:

—Ĉu vi ne povus havi helpon de via edzo?

—Li mortis antaŭ dekdu jaroj, diris Fredrika, metante la vican infanon sub la duŝon.

La intervjuanto rigardis la infanaron, kaj konstatis, ke ĉiuj estis pli junaj ol dekdu jaroj.

—Kies infanoj estas ĉiuj ĉi tiuj? li diris mirante.

—Miaj, fiere diris Fredrika. Estas ja ne mi, kiu estas mortinta, sed mia edzo.

*“Gallup”. La vorto devenas de usona institucio por esplorado de la publika opinio.

—Nu, kion vi diras pri tio, ke estiĝos dekstra trafiko?

—Estas egale. Ne estos pli da loko por la trafiko sur tiu flanko.

Pri la diferenco inter tempo kaj eterneco, klarigis la profesoro al sia juna tablonajbarino: —Kara fraŭlino, pasus tempo por mi klarigi tion, sed pasus eterneco antaŭ ol vi komprenus tion.

—Kial vi batis lin?

—Pro tio ke li moke nomis min hipopotamo.

—Kiam tio okazis?

—Kiam ni renkontiĝis antaŭ du jaroj.

—Sed la batiĝo ja okazis hieraŭ.

—Jes, sed nur hieraŭ mi vidis hipopotamon.

—Kion vi faras, knabineto? Ĉu vi intencas doni la buterpanon al la kokinoj?

—Ne, mi volas nur, ke ili metu iom da ovo sur ĝin.

—Ho, kiel soifa mi estas.

—Estas por mi granda ĝojo doni al vi iom da akvo.

—Mi diris soifa, ne malpura.

Fiŝkaptisto: —Mi certigas al vi, ke la fiŝo vere estis tiel granda. Mi neniam vidis tian fiŝon.

La amiko: —Mi kredas vin.

Amiko renkontis festenemulon postmizeran kaj demandis al li:

—Kie vi pasigis la hieraŭan vesperon? Vi ja havas vunditan vizaĝon.

—Ho je-es, vi ja po-povas kom-kom-pre-ni, mi festenis, kaj kiam mi ir-iris hej-hejmen for de la festeno, su-subite la stra-strato ekstar-staris antaŭ min kaj ba-bategis min en la vizaĝon.

Dir. P: —Ĉu vi fraŭlino, havas iajn realajn meritojn por ĉi tiu sekretaria ofico?

Fraŭlino K.: —Meritojn? Jes, tion mi povas diri. En la kvar plej lastaj oficoj, kiujn mi havis, mi estis devigita fini pro la ordonoj de la direktoredzinoj.

—Amiketo mia, kiel vi progresas pri la lernotasko?

—Mi legas ĉion, kion mi povas.

—Ĉu ne estos pli bone, se vi legus ĉion, kion vi ne scipovas?

Ĉe la barbiro

Kalvulo en razejo.

Barbiro: —Kion vi deziras?

—Forrazu la barbon, kaj metu ĝin sur mian kapon.

Kredeble li estas tre kapabla plialtigi sian salajron.

—Mi opinias, ke tio ne estas tiel stranga. Kiam li antaŭ nelonge dum la nokto sonĝis pri sia ĉefo, li notis tion kiel preterhoran laboron.

—Oni prenas kavan tubon...
—Sed, lektoro, ĉiuj tuboj ja estas kavaj.
—Jes, certe. Sed en ĉi tiu klaso oni ne povas sufiĉe klare esprimi sin.

—Okaze elironte vespere, mi vetas kun mia edzino, ke mi venos hejmen antaŭ la dekdua.
—Sed kiel do okazos.
—Jes, kutime mi lasas al ŝi gajni.

—En la vitrofarejo en H. oni fabrikas glason, kiu ne faras makulan cirklon sur la tablo.
—Ĉu vere, kiel ĝi aspektas?
—Ĝi havas kvadratan bazon.

La sekreto eduki infanojn estas scii, kiam oni malpacienciĝos.

En lernejo la instruisto klarigas al la infanoj, ke la naturo egaligas la mankojn. Do, se oni perdas la vidkapablon de unu okulo, la vidakreco iĝos tiom pli bona en la alia okulo k.t.p.

—Ĉu estas el vi, kiu povas doni alian ekzemplon? demandis la instruisto.
Eva levis la manon:
—Se iu havas kruron tro mallongan, tiukaze la alia estas tiom pli longa.

En la juĝejo

Juĝisto: —Vi ne bezonas plu nei. Jen antaŭ vi staras tri atestantoj, kiuj vidis, ke vi faris la krimon.
Akuzito: —Kion signifas tri atestoj? Mi povas nomi mil homojn, kiuj ne vidis tion.

La tradicio

Instruisto: —Tradicio estas io, kio pasas de patroj al filoj. Nun Joĉjo, faru frazon kun la vorto "tradicio".

Joĉjo: —hieraŭ mi grimpis sur la ĉerizarbon, kaj mi ŝiris mian tradicion.

Kvarjara Susanne renkontas onklinon, kiu trenas ĝemelveturileton kun la beboj kuŝantaj unu kontraŭ la alia.

Ŝi genufleksas kaj demandas:

—De kiu vi ricevis tiun ĉi bebon, onklino?

—De Dio, mia amikineto.

—Jes, mi komprenas ke estas diferenco. Ni ricevis nian bebon de la akuŝistino, sed ĝi havas kapon nur en unu fino.

Ŝi ploraĉis: —Vi rompis vian promeson al mi.

—Ne estu malĝoja pro tio, li diris. Vi ricevos novan...

En la lernejo

Instruisto rakontas pri la kuraĝo kaj forto de leono.

—Ĉu vi nun povas nomi beston, kiun la leono timas?

Unu, el la knabaro fervore signalas per la mano.

—Nu, ni aŭskultu.

—La leoninon.

Reportero vidis viron elveni el la leonkaĝo.

—Vi kredeble estas la sentima leona dresisto, pri kiu la tuta urbanaro parolas, ĉu ne?

—Ne, tute ne, li dormas en la veturilo tie. Mi nur enestis por purigi la dentojn de la leonoj.

Sinjoro Svenson lastmomente sin savis for de furioza virbovo. Veninte trans la ŝtonbarilon, li minace levis la pugnon kontraŭ la virbovo dirante:

—Kaj pri tio ĉi estas la danko, por ke mi de post dudek jaroj estas vegetarano.

—Hieraŭ mi kantis serenadon por tiu belulino, kiu ĉisemajne enloĝiĝis en la domo vidalvide al ĉi tiu.

—Nu, kio okazis?

—Ŝi transĵetis al mi malhele ruĝan rozon.

—Ĉu pro atako de subita amo?

—Ne, sed per dukilograma florpoto!

La nova aŭtoposedanto provis la novakiraĵon. Apud li sidis lia maltrankvila edzino, kiu senĉese tedadmonis lin pri lia veturado. Fine la viro kolere kriegis:

—Ĉu estas vi aŭ mi kiu veturigas?

—Ho, pro Dio, diris la edzino, ĉu vi nun eĉ ne mem scias tion.

—Kial oni nomas la uraganojn je virinaj nomoj?

—Tion ja komprenas ĉiu ajn, kiu estas vidinta antaŭkristnaskan purigadon.

Onkloro Augusta en la vilaĝo Biarum iĝos okdekjara. Kelkaj geamikoj kune kolektis monon por aĉeti libron al ŝi je la naskiĝotago. Ili telefonis al la librovendisto en la urbo kaj mendis "Predikaron" de la preposto Engstrom. Sed la librovendisto miskomprenis kaj sendis al ŝi ŝercolibron de Albert Engstrom. Poste, kiam la geamikoj renkontiĝis ili demandis al Augusta:

—Kiel plaĉis al vi la libro, kiun vi ricevis?

Tiam diris Augusta:

—Estas tre bona libro. Se mi ne estus sciinta, ke tio estas vortoj de Dio, kiujn mi legis, mi certe estus ridinta ĝismorte.

Panjo, hieraŭ Julle devis iri hejmen el la lernejo, ĉar li ne lavis sin.

—Ĉu tio helpis?

—Jes, panjo. Hodiaŭ venis ok infanoj, kiuj estis nelavitaj.

Pro kio vi ploregas, knabeto?

—Enbatante najlon, paĉjo batis sin sur la dikfingron.

—Ĉu vi, granda knabo, ploregas pro tio? Ridu anstataŭe.

—Jes, sed ĝuste tion mi faris.

Eta Nina: —Ne-e, vi ne rajtas kisi min, avino.

Avino: —Kial mi ne rajtas tion, kara infano?

Nina: —Ne-e, ĉar paĉjo diris hodiaŭ matene, ke vi havas langon, kiu estas akra kiel raztranĉilo.

—Kiun motivon havis la geedzoj separiĝi?

—Ili estis geedzoj.

—Ĉu jes, juna viro, vi volas edziĝi kun mia filino? Sed, ĉu vi havas monon por tio?

—Monon? Ĉu vi intencas vendi ŝin, s-ro direktoro.

Estas la unua tago por komencantoj kaj la instruistino rakontas amuzajn historietojn, bonhumorigante la infanojn. Ŝi videble bone sukcesas, ĉar, kiam la lecionoj estas finitaj por la tago, la eta Greta alpaŝis al ŝi dirante:

—Povas okazi, ke mi revenos morgaŭ.

—Tiu junulo, al kiu vi intencas fianĉiniĝi, ĉu li posedas monon?

—Kiel komike, paĉjo, precize la saman li demandis pri vi.

Inter la multaj amindaj anekdotoj, kiuj rakontiĝas pri la mortinta papo Johannes XXIII, unu pritraktas liajn solajn promenadojn interne en la Vatikano. Unu el la kardinaloj demandis lin, ĉu oni malhelpu la homojn eniri la katedralon de S:ta Petro, por ke ili ne fiksigardu lin.

—Ho ne, respondis ridetante la papo, mi kondutos konvene kaj ne kaŭzos ian skandalon.

Okazis en vilaĝo, ke viro estis petinta pri telefoninstalo en sian hejmon, sed la telefonlaboristoj ne alvenis. Post longa atendado la viro iris al najbaro por telefoni al la telegrafdirektoro. Li demandis:

—Ĉu vi uzas semojn aŭ plantojn, kiam vi aranĝas telefonajn fostojn?

La postan tagon oni komencis la instalon de la mendita telefono.

Benzinvendisto ekĝemis: —Tiel okazas la tutan tagon, se mi malfermas la aŭton de antaŭe la motoro estas malantaŭe, kaj mi faras tion malantaŭe ĝi estas antaŭe.

Meze de la malluma nokto, ŝi venis trotetante sur la promenada ferdeko de la vaporŝipo.

—Ŝipkelnerestro, kiel ni kuŝas tute senmove?

—Estas nebulo. Oni ne povas vidi antaŭen laŭ la rivero.

—Sed mi ja povas vidi la stelojn super ni.

—Ho jes, sinjorino, sed nur se la vaporkaldronoj eksplodos, ni iros tiun vojon.

Estas leciono pri kristanismo en lernejo, La instruistino parolas pri preĝeja jaro kaj demandas la infanojn:

—Ĉu vi scias, kiam la pasiotempo okazas?

Nur eta Karin ŝajnas scii tion, svingas la manon, kaj iom hezite diras:

—Proksimume je la deksepa aŭ deksepa jaro.

Per Olson estas akuzita ĉe la tribunalo, pro tio ke li translokigis la garbaron de la najbaro al siaj

propraj grenkampoj.

—Kio kaŭzis, ke vi faris tion? demandis la juĝisto.

—Ho jes, mi eble estas iom stranga, Per respondis.

—Ĉu iam okazis, ke vi translokigis viajn proprajn garbarojn al la kampoj de la najbaro? la juĝisto demandis.

—Ne-e, tiel stranga mi ne estas.

La juna edzino lumradiis pro ĝojo, kiam ŝia edzo hejmenvenis.

—Kara vi, ŝi diris, panjo mia ĵus skribis, ke ŝi volus viziti nin. Sed iĝos ja por la panjo tro multekosta vojaĝi tiel longvoje. Ĉu vi opinias, ke ni povus helpi al ŝi per iom da mono.

—Jes ja, karulino, diris la juna edzo, kisantante sian edzinon. Skribu al ŝi, ke mi volonte pagos la hejmenvojaĝon por ŝi.

—Ĉu viaj abeloj donis al vi multe da mielo ĉijare?

—Ne, sed ili pikvundis mian bopatrinon multajn fojojn.

Estis terura bruego en la kuirejo, kaj la konsuledzino tuj rapidas tien.

—Kia terura bruego ĉi tie?

—Bruego? respondas malafable la servistino. Ĉu vi, s-ino konsuledzino, eble opinias, ke oni povas neaŭdeble frakasi dekduon da teleroj?

—Ĉu vi vere intencas edziĝi al tiu juna virino? Vi ja povus esti ŝia patro.

—Neeble. Mi ja eĉ ne konas ŝian patrinon.

Estas interbatado en Delsbo, kaj malfrue en la nokto oni alvenas al la kuracisto, portante viron, kiu estas en malbonega stato. La kuracisto bandaĝas liajn vundojn, sed kiam liaj akompanantoj estas forirontaj, unu el ili turnas sin en la pordo dirante:

—Ne penvaloras por vi, s-ro d-ro, enlitiĝi. Ni baldaŭ revenos, portante tiun viron, kiu okazigis ĉi tion.

—Edziniĝi? ŝi diris. Mi havas hundon, kiu murmuris, papagon, kiu blasfemas, kahelfornon, kiu fumegas kaj katon, kiu ĉiunokte kuras ekstere. Kial mi havas viron...?

—Mi jam legis, ke malbelaj virinoj estas la plej bonaj dommastrinoj.

—Ĉu vere? Do vi opinias, ke mi estas malbela.

—Ne ne, kara vi, male, male.

—Kion vi studados en Upsala?

La filo de la riĉa bienposedanto Folin:

—Mi kunportos 10,000 kronojn kaj finstudos ilin unue, poste mi vidu.

Estis premiado de ĉevaloj sur la foirejo apud la stacidomo en stacia vilaĝo. Oni estis lokiginta la ĉevalojn akurate sub la dormoĉambra fenestro de la staciestro, kiu loĝis en la dua etaĝo de la domo.

Kiel kutime la ĉevaloj ofte eligas malbonan odoron, kaj pro tio la staciestro incitiĝis. Dum oni okupiĝis pri premiado, la staciestro elŝovis sian kapon tra la malfermitan fenestron kriegante: —Forkonduku la ĉevalaĉojn. Malbonodoras tiel malbenite en mia dormoĉambro. Memfida kamparano rapide respondis: —Tio tute ne ĝenas la ĉevalojn, sinjoro staciestro.

—Diru, direktoro, ĉu estas vere, kiel oni diras, ke vi postkuras knabinojn?

—Je-es, fraŭlineto, sed mi neniam bezonas kuri rapide.

—Via edzino faras impreson de iom scivola virino.

—Estas ĝuste. Estas egale malfacile kaŝi sekreton por ŝi, kiel kontrabandi sunleviĝon preter virkoko.

Ankaŭ en malliberejo oni devas esti praktika

—Kel longe vi estis kondamnita resti ĉi tie? demandis malliberulo sian novan kamaradon.

—99 jarojn. Kaj kiel longe vi restos ĉi tie?

—73 jarojn.

—Tiuokaze estos pli bone, ke vi okupos la liton, kiu staras pli proksime al la pordo, ĉar vi ja liberiĝos unue.

La urbkuracisto, la skabeno kaj la apotekisto sidis parolante pri la vivo.

—Tio eble ŝajnas stranga, diras la urbkuracisto, sed fakto estas, ke mia edzino naskis ĝemelojn tuj post kiam ŝi estis leginta la libron "Du fratoj".

—Kiel strange, diris la apotekisto, mia edzino naskis trinaskitojn, ĝuste kiam ŝi estis komencinta legi la libron "La tri muskedistoj".

La skabeno ekstaris, tre pala.

—Mi devas iri hejmen, li flustris raŭke, mi vidis, ke mia edzino sidis legante la libron "Ali Baba kaj la kvardek rabistoj".

—Panjo, mi ne povas edziniĝi al Goran. Li estas ateisto, kaj li ne kredas, ke infero ekzistas.

—Edziniĝu vi al li. Ni baldaŭ igos lin ŝanĝi opinion.

—Ĉu vi povas diri, kio estas vaporo?

—Ho jes, ĝi estas akvo, kiu ŝvitas.

Senkulpigo

Juĝisto: —Vi do konfesas, ke vi trompis la aĉetinton, ĉar vi asertis pri la ĉevalo, ke ĝi estas du jaroj pli juna ol ĝi fakte estas.

—Jes, sinjoro juĝisto, sed bonvolu konsideri, ke ĝi estas ĉevalino.

En nokto antaŭ nelonge spicaĵisto Svenson aŭdis bruon malsupre el la butikoj kaj rapidis tien por inspekti. Ĝuste. Estis enrompŝtelisto.

—Kion vi faras ĉi tie? scivolis Svenson, kaj aspektis minacema.

—Honeste dirite, mi serĉas monon, diris la ŝtelisto.

—Hm, diris Svenson. Ĉu ni ne povus helpi unu la alian? Se ni trovus ion, ni egale interdividu.

La maljuna sinjorino en la fervoja kupeo tre embarasiĝis. Ŝia hundeto faris naturbezoon sur la plankon. Kiam la kondukto alvenis, ŝi provis senkulpigi la hundeton.

—Bona kondukto, ŝi diris, mi ne povis antaŭsenti, ke tio okazus. Ĝi ne faris tion antaŭe.

—Ĉu vere, diris la kondukto. Kiom da jaroj ĝi havas?

—Tri jarojn.

—Nu, do mi devas diri, ke estas vera bezono.

—Knaboj, diris la nova ĉefo, je sia unua renkonto kun la viraro sur la granda hangarŝipo, estas unu afero, kiun mi volas, ke vi memoru. Ĉi tiu ŝipo ne estas mia. Ni ĉiuj ĝin posedas komune. Ĝi estas nia ŝipo.

—Buboj, aŭdiĝis el unu el la sekcioj, ĉu ni vendu ĝin.

—Senespere, diris la advokato, mi ne povas ĉeesti en festeno sen renkonti personon, kiu petas pri senpaga konsilo.

—Simile ĉi tie, diris la kuracisto, sed estas por mi pli facile eviti tion. Mi diras nur: Demetu la vestojn.

—Kiel vi povas esti certa, ke estas mi, kiun vi amas?

—Mi faris esploron en la imposta registro.

La jena rakonto ŝajnas esti tia pri vera demokratio. Estis zoologia leciono en la tria klaso, kaj la instruisto havis kun si leporon por montrada celo.

Estiĝis vigla diskuto pri tio, ĉu la leporo estas de vira aŭ ina sekso. Knabeto, kredeble bone sciante pri modernaj pedagogiaj metodoj, fine mansignis:

—Ni voĉdonu pri tio.

Sendknabo hazarde per sia motorbiciklo puŝis al grandampleksa, maljuna virino—des pli bone sen menciinda difekto. Ĉagrenite, ŝi ekstaris dirante:

—Verŝajne estas al vi neeble preterveturi ĉeflanke de mi, malĝentilulo.

—Ho jes, sed mi ne estis certa, ĉu la benzino sufiĉus.

Ŝia scio pri geografio ne estis tre granda. Iun tagon amikino demandis al ŝi:

—Kiel progresas via kuzo, kiu iris al Ameriko pasintan jaron?

—Mi kredas, ke li jam ne estas tie.

—Kiel? Ĉu vere?

—Ne, li verŝajne estas en Ĉinujo. Ĉar en lia plej lasta letero li skribis, ke li vivadas en Sing-Sing.

—Kiu estas la antaŭnomo de via patro? demandis instruistino al knabineto.

—Mi ne scias, iĝis la respondo.

—Nu, ĉu vi eble scias, per kiu nomo via patrino nomas lin?

—Vi maljuna azeno.

Ann-Sofie, 4 ½ jara, estis vizitinta konatan familion. Vespere post reveno preĝante sian preĝon, ŝi

finis per: ke Dio gardu onklon Allan.

Ŝia patrino demandis, ĉu ŝi ne ankaŭ preĝu por la onklino:

—Ne, ŝi helpu sin mem.

—Kuracisto preskribis, ke mi trinku akvon unu horon antaŭ la manĝo.

—Nu, ĉu vi faris tion?

—Ne, mi ne kapablis daŭrigi pli ol dum dek minutoj.

La feliĉaj geedzoj Peterson ricevis sian unuan infanon, kaj pro la ĝojo, la bogepatroj donacis al la infaneto grandan arĝentan pokalon por ornamo de la komodo.

La jaroj pasis, kaj iom post iom tie sur la komodo staras dek tiaj pokaloj.

Iutage pastro vizite alvenis. La interparolo iris malvigle, kaj, ekrimarkante la pokalojn, la pastro kaptis la okazon trovi novan paroltemon. Li demandis:

—Diru, sinjoro Peterson, kiun sportbranĉon vi praktikas?

Pastro Macintosh rimarkis, ke lia edzino zorgeme esploris la preĝejan monkesteton.

—Pri kio vi okupiĝas? li demandis iom pli akre ol kutime.

—Estu trankvila, respondis la edzino. Mi nur serĉas konvenan butonon por via nigra redingoto.

Skoto revenas el Aŭstralio post tri jaroj, kaj trovas siajn fratojn treege barbhavaj.

—Sed, kion signifas tio? Kial vi tiel aspektas? ekkriis la frato.

—Ho jes. Forvojaĝante vi ja kunprenis la raztranĉilon.

—Jen estas bela afero. La servistino avizis sian ekziĝon. Ŝi diris, ke vi insultis ŝin telefone hodiaŭ matene.

—He, pro Dio... mi kredis, ke estis kun vi mi parolis.

Jam komprenebla

—Paŭlo, kiel povas esti, ke via adicio ĉiam estas erara?

—Mi ne scias, sinjoro instruisto.

—Ĉu iu helpas al vi?

—Jes, mia patro.

—Kio estas via patro?

—Kelnero.

La fluanta scienco

Poŝtestro: —Sinjoro pastro, paketo venis por vi el la urbo.

Pastro: —Ho jes, certe estas sciencaj libroj, kiujn oni sendis al mi.

Poŝtestro: —Nur bonvolu kiel eble plej baldaŭ forporti tiun sciencon, ĉar ĝi fluas el la kesto.

Ĉefo: —Kio estas la kaŭzo, ke ĉiufoje, kiam mi envenas en vian ĉambron, vi legas ĵurnalon?

Diligenta oficisto: —Viaj kaŭĉukaj plandumoj, sinjoro ĉefo.

Bankdirektoro Guldstrom estis aranĝinta invitfestenon, kaj la gastoj estas el intermiksita speco.

Post la foriro de la gastoj, la direktoro ekrimarkis kuleron sub la tablo, kaj cerbumas:

—Kiu el ili povas havi truon en la poŝo?

—Pensu, kiel la arto disvastiĝas en la mondo.

—...?

—Jes, ni ja havas artbuteron, artfarunon, artledon, artgrason, artsterkon, kaj ni ankaŭ havas artistojn.

Estis du negocistoj, kiuj pasigis la libertempon en la Riveero kaj interbabilis en la trinkeja bufedo. La babilado pli kaj pli intimiĝis, kaj fine rakontis unu, ke li ricevis 50.000 kronojn de la asekura kompanio, kiam lia domo estas forbrulinta.

—Estas tiu mono, kiun mi nun uzas por mia libertempo, li diris.

—Proksimume tiel same por mi, konfidence la alia diris. Mi ricevis 100.000 kronojn post superakvego. La unua silentis, sed post momento li diris:

—Diru al mi—kiel oni aranĝas superakvegon?

—Estas strange, Anna, kiom da tempo vi bezonis por veni.

—Jes, mastrino, sed mi ne aŭdis la alvokon, antaŭ ol vi vokis la trian fojon.

Ĝardenisto kaptis junan ĉerizŝteliston. Kiel punon la friponeto devas manĝi 200 ĉerizojn kun la kerno, por ke li havu stomakdoloron. Tio estis la intenco de la ĝardenisto. Kiam la knabo dum la kontrolo de la ĉagrenita ĝardenisto jam manĝis duonon de la ĉerizoj, li subite komencis ridi. Al demandite de la ĝardenisto pro kio li ridas, la knabo respondis:

—Mi pensas nur pri mia frato, kiu ŝtelis melonojn.

En luksa trinkejo la gastejestro preterpasis tablon, kie kelnero ricevas mendon por kelkaj gastoj. Tiam la gastejestro perceptis jenan frazon de la kelnero:

—Jes, bedaŭrinde tre longe estas de kiam ni havis tion. La gastejestro alvokis la kelneron, abrupte akceptante, ke tiel oni absolute ne rajtas diri. Eble oni povas diri, ke ĝi ĵus elĉerpiĝis. Cetere, kio tio estas, kion ni ne havas de antaŭ longe?

—Sunbrilon, gastejestro, sunbrilon.

Li zorgas pri ŝi

—Karlo, manĝu ankoraŭ unu kukon.

—Mi ne povas, onklino, mia stomako estas jam tute plena.

—Tiuokaze metu kelkajn en la poŝojn.

—Neeble. Ankaŭ ili estas plenaj.

—Vir koko, diras maljuna grumblema sinjoro, estas bela pruvo, pri kiel frumatene la homoj devas vekigi.

—Tute ne, diris lia edzino, ĝi nur pruvas, ke la viroj komencas kii-kriegi, tuj post kiam ili ekmalfermis la okulojn.

La ebriga maljuna ŝipestro Plank envenas en plenplenan tramon kaj provas per plafona benda

tenilo kun granda peno teni sin en vertikala pozicio. Inter la pasaĝeroj troviĝas unu el la junaj pastroj de la urbo. Li proponas bonvole al P. sian sidlokon, pro la motivo, ke estus certe pli bone por P. sidi. Tiam P. radiante pro ĝojo ekdiris:

—Dankon, bona pastro, estas amuze trovi homojn, kiuj scias kiel sentiĝas esti ebria.

Fraŭlino en reklamfirmo estis tre sprita, kaj oni konsideris ŝin la plej bona en la sekcio. Iun tagon ŝi elserĉis la ĉefon de la firma kaj per sia laŭkutima decidema voĉo diris:

—Nu, direktoro, nun mi havu plialtigitan salajron.

—Sed kara fraŭlino Janetop, vi jam havas pli grandan salajron ol via plej proksima superrangulo, kaj li estas edziĝinta kaj havas kvin infanojn.

—Povas esti, respondis la fraŭlino. Sed mi opinias, ke ni ricevas pagon por tio, kion ni ĉi tie faras por la firma, kaj ne por tio, kion ni faras hejme.

Tri svedoj pasigis la libertempon en Nov-Jorko. Ilia hotelĉambro estis en 99-a etaĝo en nubskrapulo. Kiam ili envenis je la noktomezo, la pedelo sciigis, ke la lifto ne funkcias. Ho ve, diris la svedoj, demetis la paltojn kaj komencis per vigla kuraĝo supreniri laŭ la ŝtuparoj. Por faciligi la tuton, la trio decidis, ke Svenson kantu dum la irado de la 33 unuaj ŝtuparoj, Peterson rakontu anekdotojn dum la 33 unuaj sekvontaj ŝtuparoj, kaj, ke Lundstrom rakontu terurajn detektivrakontojn dum la daŭro de la restantaj ŝtuparoj. Ĉio pasis laŭplane. La plej bona rakonto venis de la lastenomita Lundstrom, kiam li preterpasis la 74-an etaĝon. Li diris:

—Buboj, mi forgesis la pordŝlosilon en la palto malsupre ĉe la pordgardisto.

Amiko, ĉu vi povas elkalkuli, kiom da katvostoj estas bezonataj por la distanco inter la terglobo kaj la luno?

—Hieraŭ mi rakontis al li pri mia tuta vivo.

—Kion li diris?

—Nenion. Sed li malsupren kombis siajn harojn, kiuj stariĝis.

—Ne, kiel mi estus scianta tion?

—Jes, sufiĉas nur unu, se ĝi estas sufiĉe longa.

—Mi havas kvar filinojn, sed neniu el ili estas edziniĝinta.

—Ĉu vere? Mi havas nur unu filinon, sed ĵus mi havis mian kvaran bofilon...

Bonstata vilaĝeto en Skanio ĝojiĝis pro vizito de akvospertulo. Li sin turnas al unu el la gvidantaj personoj scivolante, ĉu oni ne devus havigi akvodistribuejon?

—Ne estas bezonate, iĝis la respondo, ni havas niajn putojn.

—Sed ili ja povas esti danĝeraj el higiena vidpunkto.

—Neniu estas mortinta pro la akvo de la putoj.

—Povas dependi de tio, ke vi estas kutimiĝintaj al ĝi. Sed se iu fremdulo trinkus el ĝi, li povus malsaniĝi.

—Se nin vizitus fremduloj, ni ne regalus ilin per akvo.

Eltrovema knabo

—Rigardu, paĉjo, ĉi tiun violonon mi mem faris.

—Tre brave. Kaj de kie vi havis la kordojn?

—El la fortepiano.

—Ne, diris la maljuna terkulturisto, ni tute ne bezonas inĝenierojn por elkalkuli kiamaniere ni aranĝu vojojn. Ni kondukas ŝafon en la terenon kaj tie liberigas ĝin, kaj tiam ĝi iras la plej bonan vojon hejmen.

—Sed, se vi ne havas ŝafon?

—Tiukaze ni kompreneble vokos inĝenieron.

Modela edzino

Amikino al alia:

—Dum monatoj mi ne povis eltrovi, kie mia edzo pasigas la vesperojn. Hazarde hieraŭ vespere mi frue hejmeniras, kaj tiam evidentiĝis al mi, ke li estas hejme.

Juĝisto: —La atestanto diras, ke vi mordis lian orelon.

—Sinjoro juĝisto, estas nur io, kion li diras por kaŭzi ĉagrenon al mi. Vi povas esti certa pri tio, ke estas li mem, kiu faris tion.

—Kion vi opinias dirante, ke mi ŝajne memorigas pri Larson. Li ja estas altkreska kaj ruĝhara, kaj mi estas malalta kaj nigre bukla.

—Jes, ja. Sed ankaŭ li ja ŝuldas al mi cent kronojn.

Sur tribuno paroladis virino ĝis varmiĝo pri la feminisma movado kaj per la pugno frapis la pupitron, elkriante:

—Baldaŭ venos la tago, kiam la virino ricevos la salajron de la viro.

—Jes, vendredon proksiman.

La maljuna patra avino vizitas. Post ĉiu manĝo ŝi interplektas la manojn preĝante:

—Dankon, bona Dio, ke mi ankaŭ hodiaŭ satmanĝis.

Iun tagon ŝi tiom multe interparolis kun la filo, ke ŝi tute forgesis preĝi. Eta Anna-Mari volas helpi, interplektas siajn manojn kaj diras per serena voĉo:

—Dankon bona Dio, ke la avino finfine satiĝis.

Hotelestro: —Sinjoro, belega sunsubiro estas videbla. Ĉu vi ne deziras ĝin rigardi?

Gasto: —Kiom kostas?

—Kion vi faras nuntempe?

—Mi vendas meblojn.

—Ĉu vi vendas multajn?

—Provizore nur miajn proprajn.

La geamindumantoj revadas en la lunbrilo. Ŝi eligis feliĉegan ekĝemon:

—Pro kio dependas, ke vi kisas tiel diece?

—Mi estas vitroblovisto.

La maljuna Ola vizitas la urbon ĉe sia tie aktiva filo, kiu proponas, ke ili kune vizitos elegantan manĝejon. Paginte la manĝaĵon laŭ la kalkulo. Ola murmuris:

—Se mi komprenas ĝuste la prezon de la ŝinkreo, kion ni ricevis, mi havas porkon hejme, kiu malplej valoras dek mil kronojn.

—Mia bona viro, ĉu neniam estis iu, kiu proponis al vi laboron?

—Ho jes, sinjorino, tio okazis du-tri fojojn. Sed cetere ĉiuj estis afablaj al mi.

—Ne, bona ĉefkelnero, pli bongustan bifstekon ol tiun ĉi mi manĝis.

—Ne, almenaŭ ne ĉi tie.

Ne ĉiuj oficiroj estas ŝatataj kaj respektataj de la viroj en la vicaro. Tio povas havi sencon kelkfoje.

—Nu, numero 102, se vi nun rimarkus iun ekfalanta eksterŝipen, kion vi tiam farus?

—Voki: ”Viro eksterŝipen”! kapitano.

—Sed, se vi vidus, ke estas oficiro?

Numero 102 post momenta hezito:

—Kiu el ili, kapitano?

La ege ebria Stuta-Pelle estas survoje hejmen, post partopreno de emtombigo. Fine li alvenas sur fervojon kun mallarĝa relinterspaco.

Kuŝante inter la reloj kaj etendante la brakojn al ili, li faras jenan komenton:

—Estas strange, kiel malalte oni fiksas ĉi tiujn ŝtuparajn apogilojn.

La kvarjara filino de la profesoro estas komenconta en la ludlernejo, sed, pro tio ke ŝi estas tro juna ŝi subnetiĝu sub eta provo pri matureco. La estrino diras:

—Provu nun diri kelkajn vortojn, mia amikineto. Kiajn ajn, nur kelkajn vortojn, kiuj subite envenas en viajn pensojn. La infano sin turnis al la patrino demandante:

—Panjo, ĉu vi opinias, ke la sinjorino deziras logike konstruitajn frazojn, aŭ nur kelkajn indiferentajn rimarkojn?

—Li havas ĉiuokaze malfermitan vizaĝon.

—Jes. Almenaŭ kiam li manĝas.

—Ĉu mi rajtas paroli kun la direktoro?

—Ne, li forvojaĝis.

—Sed mi estas lia edzino.

—Jes, dankon, tion diras ili ĉiuj.

Motorbiciklanto ventrapide venis kun tri pasaĝeroj en la flanka ĉareto kaj du sur la malantaŭa sidloko.

Policisto mansignis kaj kriis: —Haltu!

—Mi ne havas lokon por pluraj, la juna motoristo rekriis, rapide forveturante.

—Unu el la tajpistinoj estas al dir. P. kiel osto en la gorĝo, kaj li estas tre sarkasma kontraŭ ŝi. Iun varmegan somertagon li aliras al ŝi, dirante laŭte kaj klare:

—Kiel, fraŭlino, vi povas tiel malvarme aspekti, kiam ĉiuj aliaj ĉi tie laboras ĝis ŝvitiĝo?

—Pro tio ke vi, direktoro, ĉiam tiel malvarme rigardas min.

Por deteni nedeziratajn turistojn for de sia arbartenero, iu kamparano aranĝis ŝildon kun la teksto: "Averto. En ĉi tiu arbaro estas disvastigita *Corylus avellana*".

—Nun la homoj evitas la terenon, sed la botanikistoj kaŝe ridetas. *Corylus avellana* nome estas la latina nomo de la avenujo.

—Mia nazo rompiĝis je tri lokoj antaŭ kelka tempo.

—Sed kial do viziti tiajn lokojn?

La instruistino parolas pri manĝaĵo al la etaj unua-klasanoj. Ŝi klarigas, ke ni akiras bovaĵon el la bovo, ŝafidaĵon el la ŝafido, bovidaĵon el la bovido k.t.p. Knabineto stariĝas kaj aliras al la instruistino. Ŝi malkviete rigardas la instruistinon kaj demandas:

—Sed, instruistino, marista lumbaĵo do?

La atmosfero estas streĉita dum la ripetado en la televida teatro. Ĉio pasis malĝuste por la reĝisoro, kiu fine malespere ekkriis:

—Donu al mi ian senvaloraĵon, kiun mi povus frakasi. Silento. Jen venis de unu el la teknikistoj:

—Batu la kapon kontraŭ la muron.

Domo konstruata subite renversiĝis. —Kio okazis? la konstruĝeniero demandis.

Unu el la laboristoj respondis: —Mi absolute ne scias. Kiam ni forprenis la konstrustablegojn la domo disfalegis.

—Kiaj idiotoj, la inĝeniero ekkriis. Mi ja diris al vi, ke vi ne forprenu la konstrustablegojn, antaŭ ol kiam la tublinioj estas muntitaj kaj la tapetoj surgluitaj.

Policisto haltigis peze ŝarĝitan aŭtomobilon kaj petis la ŝoforon veni eksteren.

—Kie vi havas la malantaŭan lumigilon?

La ŝoforo ĉirkaŭiras la aŭton, gratas la harojn, sed diras nenion. Ree demandas la policisto:

—Nu, kie vi havas la malantaŭan lumon?

—Vi ĉikanas min pro la foresto de la malantaŭa lumo, vi, sed mi cerbumas pri la foresto de la malbenita trenatĉaro.

—Mia edzino havas tre malbonan kutimon. Ŝi ne enlitiĝas nokte antaŭ ol matene tagiĝas.

—Ĉu vere? Ŝi estas ekstere amindumante junulojn—kompreneble.

—Ne, ŝi sidas hejme, atendante min.

Skaniano vizitas Kopenhagon kaj rigardas la rondan turon, "Rundetaarn". Dano diras al li:

—Tiajn altajn turojn vi ne havas en Skanio.

—Ne-ee, tiajn ni ne havas, sed se ni havus tiajn, ili estus multe pli altaj kaj multe pli rondaj.

Gefianĉoj sidis en restoracio. Kiam ili estas forirontaj, ŝi subite rimarkis la perdon de siaj gantoj. Li atendis apud la pordo, dum ŝi reiris al la tablo por serĉi la gantojn. Ŝi serĉis ĉie, kaj levante la tablotukon ŝi rigardis sub la tablon. Ĝuste tiam la kelnero venis al ŝi, dirante:

—Pardonu, fraŭlino, sed via kavaliro staras tie apud la pordo.

Junulino diras al amikino je enlitiĝo:

—Ĉu vi, dormante, surhavas okulvitrojn?

—Jes, mi volas vidi tiun junulon, pri kiu mi sonĝis lastnokte.

Al knabeto el la kamparo estis permesite kunveturi kun sia patro en la urbon. Ili gastigis en hotelo kaj iris en la lifton, kiu supreniris. La knabeto, kiu neniom antaŭe veturis en lifto, aspektis iom mirema.

—Ĉu vi timas? demandis la patro.

—Ho ne, respondis la knabeto. Sed vi—ĉu ne—estas skribinta al Dio kaj informis lin pri nia alveno.

Kampano vizitas jarfoiron, kondukante maljunan bovinaĉon, kiun li tre intencis vendi.

Bonkreska brutvendisto alpaŝis, demandante:

—Kiom kostas la maljuna avino?

—Jes, ĉar ŝajnas al mi, ke vi estas tiel proksimaj parencoj, mi volas vendi ĝin por malalta prezo.

Juĝisto: —Mi suspektas, ke vi batis la plendanton per ia danĝera atakilo! Jen vidu, kiel li aspektas.

Akuzito: Ne, sinjoro juĝisto, estis tutplene nur manlaboro.

Ŝi: —Ĉiu homo en tiu ĉi urbo babilas pri la kverelo ĉe gesinjoroj Karlson. Unu parto samopinias kun ŝi, kaj alia kun li.

Li: —Mi supozas ke eble ankaŭ ekzistas ordinaraj homoj, kiuj prizorgas siajn proprajn aferojn.

Li: —Mi ne komprenas, kial la viro edziĝas, li ja povas aĉeti papagon por ĉirkaŭ 20 kronoj.

Ŝi: —Ho jes, ankaŭ tiurilate estas pli bone por viroj ol por virinoj. Urso kostas minimume 500 kronoj.

—La knabinoj volas havi po dek dolaroj pli multe en ĉiu semajno, diras la artistĉefo de la noktokluba direktoro.

—Ĉu ili eble minacas per striko?

—Ne, sed ili minacas surmeti la vestojn.

—Ĉu verdire ne ekzistas ia anstataŭaĵo por benzino?

—Ho jes—plandumoj.

Viraro sur ŝipo, kiu ĵetis ankron ĉe riverbuŝo de Sumatra, sopiris al refreŝiga bano, sed ili unue

singarde demandis al unu el la enlandanoj, kiu venis sur la ŝipon:

—Ĉu ĉi tie troviĝas ŝarkoj?

—Neniaj ŝarkoj, li certigis al ili.

Do ili sin banis, sed kiam ili estis suprenvenintaj el la bano, unu el la viroj demandis:

—Pro kio ne ekzistas ŝarkoj ĉi tie?

—Tro multe da krokodiloj, iĝis la respondo.

—Ŝi faris lin milionulo dum unu jaro.

—Ĉu eble? Ĉu ŝi do havis monon?

—Ne, sed kiam ili geedziĝis, li estas multmilionulo.

—Nun mi estas aĉetinta la ŝtofon por mia edziniĝa vesto.

—Do vere, vi edziniĝos? Ĉu vi faris bonan elekton?

—Jes, 47 kronoj pometre.

Kiam profesoro Tankberg venas hejmen, li vidas sur la tablo grandan florbukedon, kaj li tuj demandis sian edzinon:

—Amalia, kion signifas ĉiuj ĉi tiuj floroj?

—Hodiaŭ ja estas via 25-jara edziĝotago.

—Tiel afable de vi pensi pri tio, la profesoro laŭdis sian edzinon. Sed diru al mi, kiam vi havos vian edziniĝan datrevenon, por ke ankaŭ mi povu ĝojigi vin.

Klarigeble

—Ho, kiel vi aspektas kun tiu bandaĝo ĉirkaŭ la kapo.

—Ho jes, mi estas pikita de kulo.

—Sed tio ja ne povis esti tiel danĝera?

—Ho ne, sed mia frato mortigis ĝin per fosilo.

—Panjo, ĉu vi volas doni al mi novan pupon?

—Estis ja nenia difekto ĉe via malnova.

—Ne sed estas ja ankaŭ nenia difekto ĉe mi, kaj tamen vi ĵus ricevis novan knabineton.

Stefano, 6-jara, vesperpreĝas:

—Bona Dio, lasu min iĝi bonkonduta kaj brava knabo, sed se tio ne povus ordiĝi, tiam donu al panjo iom pli bonajn nervojn.

Ferianta junulino demandas amikininon:

—Kia estis la akvo hodiaŭ ĉe la banstrando?

—Admirinda. Tute plena de viroj.

Sinjoro P. legas la vesperan gazeton kaj diras subite:

—Ĉi tie estas fidinda artikolo, pri kiel oni agu por iĝi centjara.

Sinjinoro P: —Donu al mi la gazeton, por ke mi legu ĝin.

Sinjoro P: —Ne-e.

La maljunulino al la kuracisto, kiu ĵus esploris ŝian edzon:

—Hu do, ĉu vi postulas 20 kronojn, por ke vi iomete penikis mian edzon en la ĝorĝon. Ĉi-somere mi pagis 20 kronojn por pentrado de la tuta domo.

—Strange, ke vi kunprenas eksteren tiel maldike vestitan knabeton. La termometro indikas ja plurajn gradojn sub nul.

—Ne estas grave, li ankoraŭ ne komprenas la termometron.

La gasto: —Ĉu tiu ĉi manĝaĵo nomiĝas omaromajonezo? Estas ja tute neniu omaro en ĝi.

La kelnero: —Ĉu vi eble iam vidis ian maristan lumbaĵon kun maristoj en ĝi?

—Kial vi bezonis treni kun vi televidaparaton el Londono? Tian vi egale bone povas aĉeti ĉi-loke.

—Ho jes, sed mi pli ŝatas la anglajn programojn, ĉar ili estas multe pli bonaj ol la svedaj.

La pastro: —Ĉu vi preĝas manĝobenon hejme antaŭ la manĝo?

La knabo: —Tion mi ne bezonas. Panjo estas tre lerta kuiri bonan manĝaĵon.

Unue estis vakcinado kontraŭ polimjelito. Maria partoprenis kaj febromalsaniĝis. Poste estis kontraŭgripa vakcinado. Maria partoprenis kaj la samo okazis. Sed kiam la kontraŭvariola vakcinado estis priparolata, Maria opiniis:

—Nun mi ne plu eltenas malsaniĝojn por resti sana.

Jan, 5-jara: —Paĉjo, vi povus doni al mi 50 oerojn por glaciaĵo.

Paĉjo: —Vi ja bone scias, ke vi ricevos vian semajnan monon sabate. Hodiaŭ estas nur jaŭdo.

Jan: —Ĉu vi vere volas, ke en miaj rememoroj restos indikita, ke mia patro estas avarulo.

Distrita maljuna sinjoro demandis al juna viro, kiu prezentiĝis al li:

—Ĉu estis vi aŭ via frato, kiu mortis ĉi-printempe?

—Kredeble estas mi, respondis la juna viro, ĉar mia frato vivas, li sidas tie.

Estiĝis granda tumulto en la vatikanaj rondoj dum la pasinta jarcento, kiam oni sciigis, ke unu monaĥo rompis sian promeson, kaj edziĝis. La sola, kiu ne maltrankviliĝis, estis la papo mem, Pius IX. Li diris:

—Se oni pli profunde pripensas la aferon, la erariĝinta monaĥo tamen jam prenis la surteran punadon per siaj propraj manoj.

—Nun vi eltrinku la kremon, tiel ke viaj vangoj iĝu iom pli grasetaj, diris panjo al Barbro.

Barbro ektrinkis, sed post momento venis:

—Aŭskultu panjo. Akurate ŝajnas al mi, ke la kremo anstataŭe malsuprenfluas en la stomakon.

Komentario de la konata pastro de la sendependa kongregacio, C.G. Hjelm:

—La kosmonaŭtoj de la rusoj imponas eĉ neniel al mi. Antaŭ 2000 jaroj la profeto Elia supreniris en la ĉielon. Li ankoraŭ ne estas reveninta teren. Li havas la mondspacrekordon de ĉiuj tempoj.

—Estas malpermesite bani ĉiloke, knabineto.
—Kial vi ne diris tion, antaŭ ol mi demetis miajn vestojn?
—Ne estas malpermesite demeti la vestojn.

La barono kaj lia servisto iris en la arbaron por ĉasi alkojn. La barono ekpafis kontraŭ kraketantan arbedon. La kraketo finiĝis per krakego.

—Ni faligis la alkon, kriis la servisto.
—Kiu ni? scivolis la barono, irante antaŭen al la arbedo.
—Diable, estas bovino, kiun ni mortpafis, li terurite diris.
—Kiu ni? demandis la servisto.

La kuracisto: —Sinjoro Karlson, faru provon tute malhavi tabakon kaj alkoholaĵon, tiuokaze ni vidos, ĉu estiĝos pli bone. Kion vi opinias pri tio?

La paciento: —Ĉu ni ne provu pliigi la konsumadon, tiuokaze ni vidos, ĉu estiĝos pli malbone.

—La nuro, kiun ni efektive scias, mia knabo, estas, ke ni nenion scias.
—Kiel vi scias tion, paĉjo?

—Ĉu vi, fraŭlino, havas ian ateston, ke vi estas sperta vendistino? demandis la sekciestro de la grandmagazeno al la serĉantino de okupo.

—Jes, mi havigis deknaŭ abonantojn al modgazeto en genudista tendaro.

La vivo havas multajn flankojn, diras privatfilozofo. Unuj homoj ĉirkaŭdiras esperante, ke ili iutage ekestu malkovrataj, aliaj esperas, ke tio neniam okazu.

—Ĉu vi opinias tion? Ĉu ili verdire pasigis tri monatojn en malliberejo? Al mi li diris, ke li forveturus por viziti siajn parencojn.

—Tion li faris. Ili ankaŭ estas en la malliberejo.

—Kien vi iros, Oskar?

—Prudenta edzino neniam demandas sian edzon, kien li iros.

—Sed prudenta edzo demandas sian edzinon antaŭ ol li foriros.

—Prudenta viro, eta Agda, ne havas edzinon.

A: —Vi, kiu scias ĉion ajn, ĉu vi povas diri, kia diferenco estas inter la unua kaj la plej lasta enamiĝo?

B: —Ho jes, oni ĉiam pensas, ke la unua enamiĝo estas la lasta, kaj la lasta estas la unua.

Knabeto sidis sur la ŝtuparo antaŭ domo maldolĉe plorante. Bonvola, maljuna virino preterpasis.

—Kio okazis, knabeto?

—Mia nova pantalono malpuriĝis pro polvo, plorĝemis la knabeto.

—Sed ĝi ja nun estas pura, mia amiketo, daŭrigis la virino.

—Jes, mi scias, ke ĝi estas tia, pepaĉis la knabeto.

—Kial vi do daŭre ploras, infano?

—Panjo ne volis lasi al mi demeti ĝin, kiam ŝi batis la polvon el ĝi.

Panjo avertas etan Tomon, kiam li postulas trian porcion da pomkukaĵo:

—Mi konis knabeton, kiu manĝis tiom da pomkukaĵo, ke li diskrevis.

—Oni ne povas manĝi tro multe da pomkukaĵo.

—Kiel do la knabeto povis diskrevi? demandis la panjo.

—Ne estis tro multe da pomkukaĵo, male estis tro malgranda knabo, respondis Tom.

—Permesu al mi kisi vin.

—Kiel? Ne forgesu, ke mi estas edzino?

—Ne, mia sinjorina moŝto. Ĉu vi kredas, ke mi aliokaze petus pri tio?

—Vi volas, ke mi defendu vian aferon. Ĉu vi havas monon?

—Jes, du mil.

—Sufiĉas. Kaj kiom vi estas ŝtelinta laŭ la akuzo?

—Du mil.

Ofersaketo rondpasas en skotlanda kongregacieto.

—Mi nenion donas al la misio, flustris MacPearson al la kolektanto.

—Do prenu moneron, Sam, flustris la kolektanto. Ĝi ja ĉiuokaze iros al idolanoj.

La maljuna Johanes apartenas al la nelacigeblaj procesemuloj. Iutage la distrikta juĝisto ŝercis kun li:

—Vi, Johanes, kiam vi eniros en la ĉielon, vi eble ekprocesos eĉ kontraŭ Nia Sinjoro.

—Nee, tion mi ne opinias, ĉar tie estos malfacile trovi juĝistojn kaj advokatojn, diris Johanes.

—Azeno, vi diras, ĉu vi opinias min?

—Ne, tute ne, ekzistas ja aliaj azenoj ol vi en la mondo.

—Rigardu ŝin. Ŝi ĉirkaŭtretetas, vestite en sia banvesto serĉante sian edzon.

—Kio estas lia nomo?

—Tion ŝi ankoraŭ ne scias.

Juna vireto estas invitita al klaskamaradeto je tagmanĝo. Post lia reveno hejmen panjo demandis, ĉu li bone kondukis.

—Jes, kvankam mi hazarde faligis la lumbaĵon sur la plankon.

—Aj! Ve! Ĉu vi delikate pardonpetis?

—Jes ja, mi diris: Tiel povas okazi, kiam la viando estas ledeca!

Lisa: —Ĉu vi ne riskas, ke li kalumnios kaj mensogos pri vi, kiam vi nun rompas la gefianĉiĝon?

Svea: —Mi zorgas eĉ neniom pri tio, se li mensogos, sed, se li rakontos la veron mi mortbatos lin.

Mezaĝa sinjorino aĉetus akvopelveton al sia hundo.

—Ĉu ni aranĝu tekston, ”Por la hundo”, sur ĝi?

—Ne estas necese, respondis la sinjorino. Mia hundo ne scias legi, kaj mia edzo ne trinkas akvon.

Ĉu vi aŭdis pri la skoto, kiu vizitis Londonon kaj telefonis al vojaĝa oficejo demandante, kiom da tempo estas bezonata por flugvojaĝo al Edinburgo.

—Momenton, respondis la virino.

—Bonege, diris la skoto, surmetante la aŭskultilon.

La kuracisto faris exploreton de la maljunulino Stina.

Li eksidis ĉe la skribotablo, dirante:

—Jes, nun mi preskribos plifortigan medikamenton. Ĝi vigligos kaj faros vin dek jarojn pli juna.

Stina: —Ho, kara. Dankon, bonvola doktoro. Sed kiel tiam okazos al la maljunula pensio?

Maljuna viro, portante retsaketon, aĉetis kelke da varoj. Pagonte la varojn li sciiĝis, ke la sumo iĝis pli alta ol li anticipis prikalkulis. Li diris:

—Jes, baldaŭ oni havos la monon en la retsaketo kaj la varojn en la monujo.

Franca ĉarmulo troviĝis kune kun du mezaĝaj fraŭlinoj en fervoja kupeo. Kiam la vagonaro envenis en tunelon, li laŭte kisis sin mem sur la manon. Kiam oni elvenis el la tunelo, li ekstaris, riverencis al ambaŭ fraŭlinoj, kaj diris:

—Estus interese scii, al kiu el vi mi devus danki por tiu ĉi neforgesebla momento.

La fraŭlinoj ankoraŭ iras kaŝe rigardante unu la alian.

Kaplaboro

Et-Emilo envenas en la kontoron de la laboreja ĉefo por de li postuli plialtigon de sia salajro. Li diras:

—Oni devas laboregi, kaj tamen la salajro ne sufiĉas por la manĝaĵo.

La korpe ampleksega ĉefo kontraŭdiras:

—Rigardu min, mi devas multe labori—mi ankaŭ—sed estas ja per la kapo.

Tiam diras Et-Emilo:

—Jes., imagu, tion ankaŭ faras la porko de mia bopatro, kaj ĝi ankaŭ pli kaj pli grasiĝas.

La diferenco

—Ĉu vi scias la diferenco inter sigelvakso kaj virino?

—Ne.

—Ho jes, la vakso brulas por ŝirmi sekreton, sed la virino brulas por ekscii ĝin.

Eta Eriko venas tagon post tago hejmen plendante, ke la instruistino estas malica kontraŭ li. Fine la patro de Eriko akompanas lin al la lernejo por ĉeesti lecionon. La instruistino tuj donas al Eriko demandon.

—Nu, Eriko. Kiom estas ses plus kvar?

Eriko sin turnas al sia patro:

—Jen, vi ja aŭdas. Nun ŝi ree komencas.

Maljuna viglulo

Maljuna forĝ-Jonas, konata kiel tiu, kiu ne rifuzas trinki glason de brando, kuŝis mortante. La uzinĉefo faras viziton ĉe Jonas, kiu malkviete diras:

—Ĉe mia entombigo, bonvolu, bona ĉefo, ordigi tiel, ke la pastro ricevas glason da brando, kaj la provinca polickomisaro ankaŭ same, kaj... kaj mi, kiu ne povos kunesti, povas trinki mian nun.

En la lernejo

Estas kristanisma leciono en la komenca klaso de la lernejo. La instruistino ĵus rakontis pri Moseo kaj la brulanta arbedo. Ŝi volis esplori, kiom la infanoj komprenis pri tio.

Pri tio ŝi demandis:

—Kiun ordonon Moseo ricevis el la brulanta arbedo?

—Ke li iru al Egiptujo.

—Tute ĝuste. Sed kion li farus tie?

—Li de tie venigus la fajrestingan brigadon.

Modernaj tempoj

Knabino en la junulinaj jaroj telefonas:

—Ne, nun mi ne havas tempon plu babili. Mi devas iri al paĉjo por helpi lin pri miaj lernotaskoj.

Heredaĵo

La popollerneja instruisto X estas konvinkita, ke la knabo Oskar havas studintereson, kaj pro tio li iutage vizitas la familion Johanson, por konvinki ilin pri la konveno lasi la filon ekstudi en la mezgrada lernejo de la urbo.

—Oskar estas absolute talenta knabo, kaj krom tio li soifas al sciado. Heredece. Ĉu ne?

SinJORINO Johanson: —La sciado tiuokaze devenas de mi, la soifo de lia patro.

Ĉe aŭguristino

—Estas bela sinJORINO, kiu sekvas vian edzon, diris la aŭguristino, pririgardinte la dismetitajn ludkartojn.

—Certe ŝi baldaŭ laciĝos, opinias sinJORINO Johanson, ĉar mia edzo estas leterportisto.

En la lernejo

Instruistino foje rakontis, ke Dio kreis ĉion, kaj ke la homo estas la plej altranga kreitaĵo. Ŝi volis scii, ĉu la infanoj komprenis la instruadon, kaj demandis:

—Kio estas la plej alta, kion Dio kreis?

Knabeto svingis la manon.

—Nu, Per!

—La arboj.

—Jes, jes, ja! La demando estis eble iom erarformulita! Sed Adamo kaj Evo do, kion ni diras pri ili?

—Ili estas paro da pomŝtelistoj...

Per tiu ĉi respondo estis neeble krei pian etoson en la klaso.

Juna vigleco

Juna viro ekmalfermis la kupepordon kaj falegis sin spiregante sur unu el la benkoj, ĵus kiam la vagonaro ekmoviĝis. Maljuna, vigla viro, kiu sidis en angulo, rigardis lin, dirante:

—Je via aĝo, mia juna amiko, mi saltis sur moviĝantan vagonaron, sen ia ajn ĝeno por mi.

—Jes, sed mi maltrafis ĉi tiun vagonaron ĉe la pli frua stacio.

—Estas terure, Doktoro. Mi imagas, ke mi estas hundo.

—Post kiam tio estas daŭrinta?

—De kiam mi estis hundido.

Ekzistas jam tiam

Ĉe uzino en Uplando troviĝis maljuna, tre religiema laboristo, konata pro sia rapidspriteco. Unu el la inĝenieroj iutage decidis iom mokŝerci kun li.

—Aŭskultu nun, Olson, ĉu vi kredas ĉion, kio staras en la biblio?

—Jes, certe mi faras tion, respondis Olson.

—Ĉu vi ankaŭ kredas tion pri Babela turo?

—Certe, li respondis. Ankaŭ tiam ja ekzistis stultaj inĝenieroj.

La potenco de la kutimo

Fremdulo alvenis al vilaĝo kaj demandis la unuan anon, kiun li renkontis:

—Mi serĉas Viktor Emanuel Johanson.

—Mi neniam aŭdis pri li. Sed iru ĉirkaŭe en la vilaĝo kaj demandu pri li en la domoj, eble vi trovos lin.

Post horo la fremdulo denove renkontis la vilaĝanon.

—Estas strange, li iris, ke neniu ĉi tie ŝajnas scii, kiu li estas.

—Ĉu li eble havas moknomon?

—Ho jes, laŭdire oni nomas lin “Bovin-Viktor”.

—Ho. “Bovin-Viktor” estas ja mi.

En la epoko de la motorismo

—Ĉu vi vere opinias, ke oni bezonas duonan horon por iri al la najbaro, kiu loĝas vidalvide trans la vojo?

—Jes. La transirejo de piedirantoj estas unu kilometron for de ĉi tie.

Bonaj novaĵoj

Knabeto alvenis de la lernejo hejmen, radiante pro ĝojo kaj ekkriis:

—Mi havas bonajn novaĵojn, paĉjo! Nenia porhejma kalkultasko plu por ni ambaŭ—mi estas eksigita de la lernejo!

Instruistino en komenca lernejo rakontas pri la kreo de la mondo kaj pri Adamo kaj Evo. Ŝi diras interalie, ke la Diablo aperis en formo de serpento.

Tiam la sepjara Evert fervore svingis la manon dirante:

—Fraŭlino, fraŭlino! Hieraŭ mi mortbatis unu diablon.

Neniu risko

—Amata Adriano, ni ne povas geedziĝi! Pensu, ĉinokte paĉjo forludis la tutan mian doton.

—Trankviliĝu, Greto, trankviliĝu! Estis kun mi li ludis.

Tien kompreneble

La avino de eta Kerstin estis mortinta, kaj la knabino sciiĝis kiel eble plej indulge de sia panjo pri la morto de la avino. Ŝi faris tion per parafrazo, ke la avino faris la plej lastan vojaĝon, de kiu neniu revenos. Kerstin estis interesata.

—Kien ŝi vojaĝis? ŝi demandis.

—Tien, kien ĉiuj homoj fine devos vojaĝi, klarigis la panjo evite.

—Ho jes, mi scias, diris Kerstin. Al Mallorca!

La katedrala preposto promenis ekster la katedralo. Estis pluvinta. Du knaboj sidis sur la irejo, ludante per la malseka gruzo. La preposto ekhaltis kaj scivolis:

—Kion vi faras, knabetoj?

—Ni konstruas katedralon.

—Ĉu vi ne ankaŭ faros preposton?

—Ne, ni ne havas sufiĉe da sablokoto por tio.

Nenia malutilo okazis

Lokomotivestro edziĝis malfrue, kaj la geedzoj nun ricevis ĝemelojn. Li komentis:

—Lokomotivestro povas facile repreni tempon de malfruiĝo.

Memkono

Ŝi: —Estas tamen strange, kiel la knabo pli kaj pli similas al vi...

Li: —Ĉu vere, kion li nun faris?

—Mi vidas, ke trinkmono estas malpermesita ĉi tie.

—Jes, diris la kelnero, tio ankaŭ estis la pomoj en la ĝardeno de Edeno.

—Knabo. Ĉu vi ne hontas komenci mensogi jam je via aĝo.

—Kiam mi do rajtas komenci?

Konata aviadisto sidis apud konata kuracisto en restoracio en Nov-Jorko por tagmanĝi.

—Ĉu vi neniam havis intereson fari flugveturon? scivolis la piloto.

—Jes, unu fojon. Tio okazis en la jaroj de junula nesperteco, sidante kune kun sinjorino en ĉambro de la 35-a etaĝo, kiam subite ŝia edzo hejmenrevenis.

Ĉiam rapidsprita

Karlson, ĉiekonata pekulo, renkontas sinjorinon Johanson, kiu, laŭ propra opinion, estas senerara.

K: —Estas ja senĉesa pluvaĉa vetero.

S-ino J: —Jes ja, tion ni havas pro niaj pekoj.

K: —Tiukaze, s-ino Johanson, provu pliboniĝi, ĉar ni aliaj turmentiĝas pro tio.

Danĝere

—Mi devas ĉesigi la drinkadon, ĉar estante ebria, mi ĉirkaŭiras, pagante ŝuldojn faritajn, kiam mi estis sobra.

La skoto

Li aĉetis aspirinon en apoteko skotlanda. Veninte iom distance laŭ la strato de la apoteko, la apotekisto postkuris lin kriante:

—Estas terure. Mi donis al vi strikninon anstataŭ aspirino.

—Kia diferenco estas? demandis la kliento.

—Kvin ŝilingoj kaj du pencoj.

La stranga pordo

Viro iutage mezuris la pordon de la vilaĝa drinkejo. Li mezuris kaj kalkulis, mezuris denove kaj kalkulis. Dum la tempo popolamaso kolektiĝis, rigardante la viron kaj lian mezuradon. Li ne estis nekonata viro, sed la plej konata drinkulo de la loko.

Fine li diris kvazaŭ al si mem: —Kia stranga pordo! Ĝi estas nur du metrojn alta kaj unu metron larĝa. Mi iam havis belegan domon, ĝi eniĝis en la drinkejon tra tiu ĉi pordo. Mi posedis domon kaj hejmon, belajn grenkampojn kaj herbejoj—ili iris la saman vojon. Kaj tamen la pordo estas nur du metrojn alta kaj unu metron larĝa! Ĉio, kion mi iam posedis—bonstato, reputacio, honoro, saneco—ĉio traĝis tra tiu ĉi pordo. Estas nur mi, kiu jam ne povas eniri tra ĝi, ĉar mi ne plu havas monon.

—Nun vi efektive devas trankviliĝi, eta Elsa, kaj iĝi bonkondata knabineto. Aliokaze vi ne povas enveni en la ĉielon.

—Ne gravas. Ĉi tiun semajnon mi estis en kinoteatro kaj en cirko, kaj oni ja ne povas esti ĉiuloke.

La malgranda kumunumo estis aĉetinta novan fajrestingan aŭtopumpilon. Bienposedanto, kiu kontraŭstaris la novakiraĵon, ekdiris, rigardante ĝin:

—Multe da grandaj brulakcidentoj estos bezonataj, por ke ĝi donu profiton.

—Kie nun troviĝas Karl Svenson? Mi de longe ne vidis lin.

—Li estas kondamnita al kvarmonata malliberigo, ĉar li ŝtelis aŭtomobilon.

—Kia frenezulo. Kial li ne aĉetis aŭton per partopago kaj preterlasis pagi ĝin, akurate same kiel aliaj honestaj homoj.

—Ĉu vi ricevis ĉi tiujn perlojn de Eriko? Ili estas belaj sed ne malfalsaj.

—Ĉu vere? Ĉu vi havas bonan konon pri perloj?

—Ne. Sed mi bone konas Erikon.

Skota dankemo

Iun tagon sinjoro McNutt eniris al kuracisto en la bona urbo Aberdeen.

—Mi volas nur preterpase viziti por danki al vi, doktoro, kaj mencii kiel bonan utilon mi havos pro la kuracado de vi, li diris tre afable.

—Sed... Vi ja ne estas mia paciento, balbutis la mirigita kuracisto.

—Ne, respondis McNutt, sed mia ĵus mortinta onklo estis via paciento, —kaj mi heredos lin.

Praktike

—Tiuokaze vi povas kompreni, mi diris al Karlo, ke mi ne plu volas vidi vin.

—Ĉu li do foriris?

—Tute ne. Li nur iris al la pordo kaj estingis la lumon.

Matematiko

En la lernejo la instruistino provis instrui siajn etajn gelernantojn iom pri la subtraho.

—Vi ja havas dek fingrojn, ŝi diris. Se vi havus tri fingrojn pli malmultajn—kio do estiĝos?

—Neniuj fortepianaj lecionoj, ravite diris la eta Tobias.

Paĉjo diris per malafabla voĉo al sia dekokjara filino:

—Aŭskultu, Agneta, tiu juna viro, kun kiu vi konatiĝis, restas tro longe dum la vesperoj. Ĉu ne panjo al vi diris ion pri tio?

—Jes panjo diris, ke la junuloj neniom ŝanĝiĝis, de kiam ŝi estis junulino!

La mensogema hundo

Johanson asertas al sia amiko, ke lia hundo mensogas.

—Kiel? Vi nur babilas! diris nesingarde la amiko. Hundo ja ne povas mensogi!

—Ĉu ĝi ne povas!?! Ĉu ni vetu?

La veto validas dekkronan monbileton, kaj la du amikoj kune iras al la hejmo de Johanson. La hundo estas envokita kaj J. diras:

—Nu Karo. Kion diras la kato?

—Vaŭ, vaŭ! bojis Karo.

La amiko ne povis ne transdoni sian dekkronan monbileton.

Respondo laŭ merito

Alexander Dumas, la maljuna, estis treege memkontenta sinjoro, kaj lia filo kun la aldono, la juna, proksimume pravis, kiam li iufoje pri sia patro diris: —Mi neniam estas aŭdinta lin diri malbonan vorton pri iu —sed mi ankaŭ neniam aŭdis lin paroli pri iu alia ol si mem.

Nekonata verkisto iam sendis al Dumas, la maljuna, kiam tiu estis plej populara, resumon de teatraĵo, proponante al la eminenta verkisto, ke ili kunlaboru. Konsternita pro tiu ĉi nekredbla memkontenteco—kiu eĉ superis lian propran—Dumas ekprenis la plumon kaj skribis sian respondon per simpla frazo:

—Kion vi opinias, sinjoro, per tiu ĉi propono: jungi ĉevalon kaj azenon al la sama veturilo?

La postan tagon li ricevis la respondon:

—Kion vi opinias, sinjoro, nomi min ĉevalo?

La poŝtaĵo de la sekva tago alportis la respondon de Dumas:

—Mia kara amiko, sendu al mi plej baldaŭ vian teatraĵan manuskripton.

El dana gazeto ni ne povas ne eltranĉi anoncon, kiu, se ĝi ne koncernas preseraron, verŝajne indikas alte intensan naskotakton:

—Se vi estas infanamantino kaj interesiĝas pri mastruma laboro, ni havas okupon por vi. Ni havas kvar infanojn en aĝoj 10, 7, 4, kaj 2 monatojn.

Famekonata hirurgo diris dum prelego, ke foje okazis post operacio ke la maldekstra kruro fariĝis iom pli mallonga ol la dekstra, kio kaŭzis, ke la paciento lamis. Poste la profesoro subite paŭzis kaj turnis sin al la juna kandidato Jonebar, kiu sidis meze de la aŭditorio:

—Kion farus vi en tia okazo?

Post momenta cerbumo la kandidato respondis:

—Jes, sinjoro profesoro, kredeble ankaŭ mi estus lamanta.

Magistro montras kranion.

—Ĉu estas iu el vi, kiu povas diri, ĉu tiu ĉi kranio apartenas al viro aŭ virino? li demandas.

—Al virino, iu respondas.

—Kiel vi povas vidi tion?

—Je la makzeloj. La ĉarniroj estas eluzitaj, respondas la lernanto.

Policisto: —Mi ne povas kompreni, de kie vi, sinjorino Jonson, akiris tian fortegon por firmteni tiun fortan enrompiston.

Sinjorino Jonson: —Mi kredis, ke estis mia edzo, kiu intencis forŝteliĝi eksteren.

—Nu, maljuna knabo, ĉu vi estas kontenta esti edziĝinta?

—Jes, mi ne devas plendi. Mia edzino helpas min je kuirado kaj serviclavado.

Familia rondo

—Kial via edzino hodiaŭ estas tiel malbonhumora?

—Unue ŝi riproĉis la servistinon, poste ŝi riproĉis min, ĉar mi ne riproĉis la servistinon. Kaj nun ŝi riproĉas sin mem pro tio, ke ŝi ne riproĉis min pli forte, ĉar mi ne riproĉis la servistinon.

Ĉe akcidentoj

Ĉe fervoja stacio iam oficis staciestro, kiu estis malcedema fraŭlo. Iun tagon la personaro scietiĝis, ke li intencis edziĝi al sia mastrumistino.

Samtempe okazis demandado pri la sekurigaja dekreto. Tiam okazis, ke la vagonara ekspedanto ricevis la demandon:

—Kiam oni uzas petardojn?

—Kiam la staciestro Akeson edziĝos?

—Kiel?

—Jes, tiam ni ja metos petardojn sur la relojn sub la iranta edziĝfesta vagonaro por fari honorsaluton. La pridemandanta gvidanto post iom da cerbumo diris:

—Certagrade vi pravas. Petardoj ja estas uzataj ĉe akcidentoj.

Blomstorm sin forŝiris el la kutimo kaj estis partopreninta kostumfestenon. Je la kvara frumatene li deprenis siajn ŝuojn en la antaŭĉambro, kaj ŝanceliĝis kiel eble plej senbrue en la dormoĉambron. Fantomoneca en sia blanka, nokta ĉemizo ellitiĝis virino, kaj B. malklare babilis:

—Mi esp-esperas—hik—ke vi ne estas kolera, amatino, pro tio, ke iĝis—hik—iom malfrue.

—Tute ne, sinjoro Blomstorm, diris la sinjorino. Sed pro certeco vi devas demandi vian edzinon en la proksima supra etaĝo.

Fatala erardiro

Dum festeno li havis fraŭlinon kiel tablonajbarinon al kiu li estis enamiĝinta. Ŝi ne sciis tion, ĉar li estis tro hontema por sciigi tion al ŝi. Sed nun estis necese fari bonan impreson. La koro batis, li ne povis trovi ion por diri, li sidis nur fositante en la manĝaĵo. Fine ŝi rompis la silenton:

—Mi do devas diri, ke vi malmulte manĝas.

—Jes, li diris ruĝiĝante, kiu povus ne perdi la apetiton, kiam oni havas tian fraŭlinon kiel tablonajbarinon.

Amo al infanoj

La nova infanvartistino elmetiĝis al radikala pridemandanto de la sinjorino, kiu finis per jena demando:

—Ĉu estas tute certe, ke vi sentis amon al la infanoj de la familio, kie vi havis okupon?

—Jes, respondis la okuposerĉantino, estis la nura motivo, kial mi devis fini la antaŭan okupon.

—Estas strange.

—Jes, estis precipe la plej aĝa knabo...

—Ho, Kiom da jaroj li havas?

—Dudek jarojn.

Li sciis pli bone

En la malnova, gaja Vieno situis apud Petersplatz noktkafejo nomita Nachtfalter. Tie oni rapide havigis al si gekonatojn, kaj tiu, kiu alvenis tien sola, malofte iris sola de tie.

Iun vesperon edzo deziris amuziĝi kaj devojiĝis en la kafejon. Sed la ĝojo iĝis mallonga. Lia edzino aperis, kaj ŝi estis kolera kiel abelo. Ŝi kverelegis, kaj fine la edzo entiris ŝin en droŝkon, kaj donis al la droŝkisto la adreson de sia hejmo.

Sed la edzino daŭrigis la kverelon. Tiam la droŝkisto haltis la veturilon, enŝovis la kapon dirante:

—Sinjoro, tiu virino do ne estas io por havi. Ni elŝovu ŝin ĉi tie, kaj reveturu por venigi alian.

Malfacile flatata

Oni diras pri John D. Rockefeller, la maljuna prapatro de la usonaj oleomilionuloj kun la sama nomo, ke oni povus ekhavi monon de li, se oni nur rakontas veran kaj kortuŝan rakonton.

Iun tagon lin haltigis sur la strato entreprenema almozulo, kiu elpensis tian rakonton.

La viro diris:

—Sinjoro Rockefeller, mi estas migrinta tre longan vojon por ekhavi permeson paroli kun vi. Kaj ĉiuj, kiujn mi trovis sur la vojo, rakontis al mi, ke vi estas grandanima kaj malavara homo.

—Hm, diris R., ĉu vi reiros la saman vojon?

—Jes.

—Bonege. Ĉu vi tiam bonvolus dementi tiun famdiron kiel eble plej forte!

Kompleza policisto: —Per ĝi vi ne povas malfermi pordegon. Estas ja cigaro...

Tro ebria viro: —Jes fakte. Ĉu mi do vere forfumis la ŝlosilon!?

—Vi estas akuzita pro tio, ke vi diluis lakton per akvo, diris la juĝisto al la akuzito. Ĉu vi havas ion por diri kontraŭ tio?

La akuzito respondis:

—Certe, sinjoro juĝisto, la tagon antaŭe pluvegis, kaj la nuro kiun mi povas imagi, estas, ke la bovino tute tramalsekiĝis.

Ŝi konsultas kuraciston plendante pri sia ĉagreno.

—Mi estas nervoza kaj stranga. Mi frakapas multe da porcelano, purigante la servicon, kaj tio faras min ankoraŭ pli nervoza.

—Hm, jes, diris la kuracisto, mi preskribos ion. Elprovu tiun medikamenton kaj revenu post semajno. Post paso de tiu tempo la sinjorino revenis vigle kaj ridetante.

—Ĉu vere, diris la doktoro, tio ja helpis! Ĉu vi nun ne plu frakapas porcelanon?

—Certe, sed nun tio ŝajnas al mi amuza!

Profesoro tagmeze alvenis hejmen, triumfe antaŭtenis pluvombreton kaj gaje diras al sia edzino:

—Jen vi vidas, ĉi-foje mi ne forgesis ĝin.

—Jes, bone, sed vi ja ne kunhavis pluvombreton, elirante ĉi-matene.

Paroĥestro petis al la kantoro sin sekvi en la sakristion por diri al li kelkajn seriozajn vortojn:

—Morgaŭ vi rondiros kun la ofersaketo antaŭ la diservo.

—Antaŭ? Pro kio?

—Jes, mi predikos pri ŝparemo.